



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

11
1972



Laboristinoj de la Luojiang-a Lagrofabriko de Henan-provinco ekzamenas kvaliton de produktaĵoj.

Foto de Vej Deĝong

Antaŭenmarŝas la Baj-nacia Popolo

Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la nacia politiko de la Partio, la baj-nacia popolo de Dali, Junnan-provinco, ricevis riĉan rikolton en la sinsekvaj jaroj dank' al akvoutiliga kaj kampa konstruado. En 1971, la produktokvanto de greno de la tuta aŭtonoma subprovinco kreskis je ĉ. cent procentoj kompare kun tiu en la komenca periodo de la Liberigo. Kaj iom post iom ĝi starigis diversajn industriajn branĉojn de elektro, agrokulturaj maŝinoj, kemia sterko, ŝpinado kaj teksado ktp, komencante de nulo.



Baj-nacia arbosegistino
mpartianino Li Jun-
de Ninglang-fors-
kulturejo



Cementfabriko pligrandigata


Ĝaŭ Gijuan, vicesekretario de la Kompartia Komitato de Dali-gubernio, ekzamenas tritikon kune kun membroj de Ĉenggiaŭ-komunumo.



Baj-naciaj membroj de Jinkiaŭ-komunumo de Dali-gubernio disvolvas kulturadon de tearboj sur montodeklivoj.







Propaganda Taĉmento de Baj-nacia Aŭtonoma Sub-provinco de Dali kantas kaj dancas por la amaso.

La vivnivelo de la baj-nacia popolo senĉese altiĝas. La foto montras ke komunumaninoj elektas por si flordeseĝnan ŝtofon en butikoj.



Baj-naciaj knabinoj veturas al foiro.



Sukcesoj en la Socialisma Konstruado de Ĉinio

JAM pasis 23 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Nia lando trairis profundan ŝanĝigon kaj konstruiĝis en unuapase prosperan socialisman landon.

RIĈAJ RIKOLTOJ DE AGRIKULTURO EN 10 SINSEKVAJ JAROJ

Prezidanto Maŭ montris: “**Nur socialismo povas savi Ĉinion!**” Sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, en 1956 fundamente efektiviĝis agrikultura kooperativo en nia lando.

En 1958, direktate de la ĝenerala linio de la Partio pri socialisma konstruado, ellaborita de Prezidanto Maŭ, aperis vigla impetado en la nacia ekonomio kaj la nova formo de popola komunumo sur la bazo de agrikultura kooperativo en la vasta kamparo. La komunumigo impete antaŭenpuŝis la agrikulturan kolektivigon al nova stadio.

La popola komunumo estas la baza unuo en organiza formo de kombiniĝo de registara kaj komunuma administrado en kamparo de la socialisma socio de nia lando. Ĝi estas pli granda kun

pli alta socialisma naturo, kaj sub la principoj de distribuo al ĉiu laŭ lia laboro kaj interŝanĝo je egala valoro, oni povas koncentri laborfortojn por fari grandskalan fundamentan konstruadon de kampoj, disvolvi agronomian eksperimentadon, kontraŭbatali kaj preventi naturajn katastrofojn kaj apliki multespecajn mastrumadojn de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado kaj starigi malgrandajn entreprenojn de industrio, riparado kaj transportado, kiuj servas al agrikulturo.

Dank’ al kolektiva forto de komunumo, nia lando venkis diversajn naturajn katastrofojn kaj akiris riĉajn rikoltojn en 10 sinsekvaj jaroj. En 1971, la produktokvanto de greno de nia lando atingis 246,000,000 tunojn, t.e. pliiĝis je 50,000,000 tunoj ol tiu de 1957 kaj je pli-ol-1-oblo ol tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. Kaj relative grandan disvolviĝon ni akiris ankaŭ en forstokulturo, brutobredado, flankokupoj, fiŝado kaj kulturo de ekonomiaj plantaĵoj. La greno produktita de nia lando tiel abundas, ke krom la kvanto de enlanda konsumo ne nur la ŝtato sed ankaŭ multaj produktaj grupoj kaj familioj de komunumanoj havas certan kvanton da rezervata greno. La enspezo de la komunumanoj pli kaj pli multiĝas. Ekŝanĝiĝis la longdaŭra stato de transportado de greno de la Sudo al la Nordo.

NOVAJ SUKCESOJ SUR LA INDUSTRIA KAJ KOMUNIKA FRONTOJ

Antaŭ la Liberiĝo, la moderna industrio de nia lando estis preskaŭ nulo, estis nur iom da kolonia aŭ duonkolonia malpeza industrio ĉe la marbordo sed preskaŭ neniom da peza industrio. Kaj nia industrio estis plipostiĝinta je 1 eĉ 2-3 jarcentoj kompare kun tiu de la disvolviĝintaj kapitalismaj landoj. Ja estas tre malfacile disvolvi industrion sur tia bazo. En tiu afero ni starigis por ni la politikon de sinapogo sur la propraj fortoj. En la komenco de la Unua Kvinjara Plano (1953-1957), nia Partio jam difinis tiun politikon por efektiviigi socialisman industriigon. Sub la direktado de la politiko, nia popolo pene luktis kontraŭ malfaciloj, venkis ilin kaj gajnis rimarkindajn sukcesojn sur la industria kaj komunika frontoj.

Ni prenu la feran kaj ŝtalan industrion kiel ekzemplon. Antaŭ la Liberiĝo, la nura malmultprodukta industrio de fero kaj ŝtalo de nia lando koncentriĝis en kelkaj marbordaj urboj. Sed en la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, ne nur la malnovaj feraj kaj ŝtalaj entreprenoj rejuniĝis, sed ankaŭ la novaj vigle disvolviĝas en internaj lokoj. Laŭ la direktivoj de Prezidanto Maŭ **“kun ŝtalo kiel ĉefĉenero”** kaj **“ekspluati minojn”**, la vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj energie ekspluatis minojn, kaj la ŝtala kaj fera produktado pliboniĝis ol iam ajn en la pasinteco. En 1971, la produktokvanto de ŝtalo kaj fero atingis 21,000,000 tunojn, t.e. 140-oble pli multa ol tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo kaj preskaŭ 4-oblo de la 5,350,000 tunoj de 1957. La ŝtala produktokvanto en 1971 egalas al 3-oblo de la totala produktokvanto de la 59 jaroj, de 1890 kiam naskiĝis la unua fera-ŝtala fabriko ĝis la jaro 1949.

La pliprodukto de greno, fero kaj ŝtalo pretigis favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de aliaj ekonomiaj branĉoj. La totala industria produktovalorado de 1971 estis je 19-oblo pli multa kompare kun tiu de 1949, kaj dum tiu periodo la produktokvanto de karbo, elektro, kotonaj fadeno kaj teksaĵo, maŝinoj kaj kemiaĵoj kreskis pluroble aŭ kelkdekoble. Pli rapide disvolviĝas nia petrola industrio. Nun ni ne nur povas produkti sufiĉe da petrolo por kontentigi la enlandan bezonon sed eĉ eksporti malmulton da tio al amikaj landoj. La petrolo produktita en 1971 estis je pli-ol-300-oblo pli multa ol tiu de 1949. Estas aparte rimarkinde, ke sub la gvido de la ĝusta politiko elmetita de Prezidanto Maŭ kura-

ĝigi la du aktivecojn de la centraj kaj lokaj aŭtoritatoj, la mezgrandaj kaj malgrandaj lokaj industrioj vigle disvolviĝis. En 1971, la lokaj malgrandaj feraj kaj ŝtalaj fabrikoj produktis milionojn da tunoj da gisfero; la produktokvanto de la malgrandaj cementfabrikoj okupis 44% de la totala produktokvanto de la lando; tiu de la malgrandaj kemi-sterkaj fabrikoj okupis 60% de la totala produktokvanto de la lando. Ankaŭ sur la tibeta altebenejo stariĝis karbaj minejoj, hidroelektrejoj, ŝpinteksejoj, maŝinaj prilaborejoj kaj aliaj lokaj industriaj entreprenoj. Pli ol 96 procentoj de la gubernioj de nia lando havas riparejon aŭ fabrikon de agrikulturaj maŝinoj. La disvolviĝo de lokaj industrioj ludos ĉiam pli gravan rolon en rebonigo de la industria dislokiĝo de nia lando kaj subteno al agrikulturo.

Rapide disvolviĝis ankaŭ la komunikaj kaj transportaj aferoj. En nia lando jam fundamente formiĝis reto de fervojoj, aŭtovojoj kaj akvovojoj. La transportata kvanto de pasaĝeroj kaj varoj multiĝas jaron post jaro. La reto de poŝto kaj telekomuniko envolvis ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn de la lando.

Je la fino de 1971, la longeco de la trafikeblaj fervojoj de nia lando estis pli-ol-4-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. La ĉefaj fervojaj linioj jam etendiĝis en la vastajn regionojn de la Nordokcidento kaj Sudokcidento de nia lando. Nuntempe sin trovas fervojo en ĉiuj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj escepte de Tibeto, tiel ke fundamente ŝanĝiĝis la antaŭa malracia stato, ke la fervojoj de la malnova Ĉinio plejparte troviĝis en la Nordoriento kaj marbordaj areoj. Dum dekoj da jaroj la malnova Ĉinio konstruis nur cent kelkdek mil kilometrojn da aŭtovojoj, el kiuj nur duono taŭgis por trafiko antaŭvespere de la Liberiĝo, pro tio ke la kvalito de ili estis tre malbona kaj mankis al ili necesa riparo dum longa tempo. Sed, post la konstruado dum la pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, la longeco de la trafikeblaj aŭtovojoj kreskis je pli-ol-8-oblo kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. Ili ludis gravan rolon en la socialisma konstruado kaj prosperigo de ekonomio de nia lando.

Multaj riveroj kaj lagoj estas en nia lando. Je la fino de 1971, la longeco de la trafikeblaj internaj akvovojoj de Ĉinio duobliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. En la pasinteco ni ne havis oceanan ŝipon. En 1961, nia unua oceana ŝipo komencis sian servon, kaj de tiam rapide multiĝis tiaj ŝipoj. Nun niaj oceanaĵaj ŝipoj vizitis pli ol 170 havenojn de pli ol 50 landoj kaj regionoj en la mondo, farante siajn kontribuojn al

la vastigo de la eksterlanda komerco kaj pliigo de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

SENĈESA ALTIĜO DE LA NIVelo DE NIAJ SCIENCO KAJ TEKNIKO

La scienco kaj tekniko estas grava parto en disvolviĝo de la tuta nacia ekonomio. Ekde 1964, sin apogante sur propraj fortoj, la laboristoj kaj teknikistoj de nia lando eksplodigis atombombojn, hidrogenajn bombojn kaj poste lanĉis artefaritan ter-sateliton al la ĉielo.

Krome, ni mem projektis kaj konstruis la Nankin-an Pontegon super Jangzi-rivero; ni atingis unuapŝan solvon de la problemo de grundo-malleviĝo de Ŝanhajo; ni fabrikis 125,000-kilovatan generatoron kun interne farita duobla akva malvarmigo; ni kreis la novan teknikon de libera laborado sur alttensia linio de 220,000 voltoj; en 1966, kreiĝis sur petrolkampo la jara enbora rekordo de 100,000 metroj, kaj en 1971 la nova rekordo de 120,000 metroj; kaj nia lando sukcesis fari sintezan insulinon plej frue en la mondo. Heredinte la valorajn atingajojn de la medicino kaj farmakologio de la patrolando, niaj medicinistoj kombinas la ĉinan medicinon kun la okcidenta kaj en sia senĉesa praktikado elbatis novan vojon en diversaj sektoroj kiaj anestezo per akupunkturo en operacio, kuracado de grandarea brulvundo, rekunigo de derompitaj membroj kaj kuraco de surdmutuloj.

PROSPERA MERKATO KAJ STABILAJ PREZOJ

La rapida disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo havigas al la merkato riĉajn fontojn de varoj. La ĉirkola kvanto de varoj ĉiam grandiĝas kaj la merkato estas en prospero. La kvantoj de aĉetitaj, venditaj kaj stokataj varoj de la komercaj organoj plimultiĝas samtempe. La totala valoro de la detalitaj varoj en 1971 kreskis pli-ol-5-oble kompare kun tiu de 1949. La enspezo de niaj popoloj pli kaj pli multiĝas kaj ilia vivo boniĝis rimarkinde.

En la pli ol dudek jaroj post la Liberiĝo, la prezoj de greno, ŝtofo, oleo, salo kaj aliaj varoj de nia lando ĉiam estas stabilaj. La prezoj de iuj ĉiutagaj bezonaĵoj eĉ iom malaltiĝis. La prezoj de medikamentoj, kuracaj instrumentoj kaj ĉinaj drogoj bezonataj de la popolo estis plurfoje malaltigitaj kaj en 1969

ili estis refoje malaltigitaj grandskale. La nunaj prezoj de kuraciloj estas 80-pocente pli malaltaj ol tiuj en 1950. Tio garantias bonan vivon al la popolo. Sekve de la pliboniĝo de sia vivstato, la vastaj popolamasoj ĝenerale ekhavis portempe nebezonatan monon, kiun ili metis en ŝparkasojn. La ŝpardeponoj en la popolaj bankoj de la tuta lando kreskis grandskale. La nuna deponita monsumo en la urboj kaj urbetoj kreskis 7-oble kaj tiu en la kamparo centoble kompare kun tiu de 1952. La stabileco de la varprezoj signifas stabilecon de la ĉina mono *ĵenminbi*. Tio ĉi estas akra kontrasto kun la inflacio, rapidega altiĝado de varprezoj kaj mizereco de la vivo de la popolo en la malnova Ĉinio. *Ĵenminbi* jam fariĝis stabila mono malofta en la mondo.

Ankaŭ la financo de nia lando estas en bona stato. En 1965 ni jam likvidis antaŭdate nian ŝuldon al Sovetunio, kaj en 1968, la enlande prunto-prenita mono de la ŝtato estis tute repagita kun interezo en ĝusta tempo, tiel ke nia lando fariĝis lando sen en- kaj ekster-landaj ŝuldoj.

Kvankam nia lando akiris grandan sukceson en socialisma konstruado, sed tio estas nur la unua paŝo en longa marŝo. Ankoraŭ nealta estas la nivelo de la ekonomio, sciencoj kaj teknikoj de nia lando. La meznombra produktokvanto de ŝtalo kaj greno por ĉiu loĝanto de nia lando estas ankoraŭ tre malalta. Nia popolo nun batalas kaj strebas por ŝanĝi tiun postĝintan pozicion, konstrui pli riĉan socialisman Ĉinion kaj pli bone plenumi nian devon internaciisman.




Nia Karba Industrio en Prosperigo

ĈINIO havas historion de ĉ. cent jaroj de grandskala ekspluatado de karbomino. Antaŭ la Liberiĝo, por akiri grandan profiton, la kuo-mintanga reakciularo kaj imperiistoj kruele ekspluatis la laborantan popolon, aplikante barbaran raban rimedon, tial mizeraj estis la ekipaĵoj, postiginta la tekniko, malalta la produkta nivelo kaj

tre malrapide disvolviĝinta la karba industrio. Dum la sepdek tri jaroj de 1876 ĝis 1948, oni mal multe faris prospektoradon pri la rezerva kvanto de karbo, konstruis nur pli ol 20 karbominejojn, kiuj koncentriĝis plejparte en nordorienta kaj norda Ĉinio. Ĝis la Liberiĝo la karba produktokvanto de nia lando atingis nur pli ol 30,000,000 tunojn.

Karbo produktita de Ŝaŭvu-karbominejo de Fugian-provinco estas transportata al aliaj lokoj.



En la jaro 1949, la ĉina revolucio akiris grandan venkon, kaj la karbominejoj okupitaj de imperiistoj kaj burokrata burĝaro revenis en la manojn de la popolo. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, niaj karboministoj faligis la feŭdajn laborĉefojn, abolis la kapitalisman administran sistemon pri entreprenoj kaj starigis iom post iom la socialisman kun laboristoj kiel mastroj. Post la konstruado dum la periodo de restarigo de la nacia ekonomio (1950-1952) kaj la Unua Kvinjara Plano (1953-1957), nia karba industrio rapide progresis kaj ĝia jara produktokvanto atingis 130,000,000 tunojn. De la jaro 1958, sub la direktado de la ĝenerala linio de socialisma konstruado de la Partio, la karba industrio estis impete disvolvata, kaj la produktokvanto de karbo en 1959 estis 3.8-oblo de tiu de 1957. La Granda Proletara Kultura Revolucio forte stimulis la disvolviĝon de nia socia produktforto. La tutlanda karba produktokvanto de 1970 pliiĝis je 52.7 procentoj ol tiu de 1965, la jaro antaŭ la kultura revolucio, kaj la karba produktokvanto difinita de la Tria Kvinjara Plano (1966-1970) estis antaŭdate plenumita. Kaj la produktokvanto de 1971 pliiĝis je 12.4 procentoj ol tiu de 1970. La karba industrio en bonega stato faris kontribuojn por la disvolviĝo de industria kaj agrikultura produktado kaj kontentigo de bezonoj de la popola vivo.

REJUNIĜO DE MALNOVAJ KARBOMINEJOJ

Kiel trakti la malnovajn karbominejojn postlasitajn de la malnova Ĉinio? En tio ekzistis batalo. Influite de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, iuj burĝaj teknikaj "aŭtoritatuloj" opiniis, ke jam "elĉerpiĝis la latentaj fortoj" de la malnovaj karbominejoj kaj ilia "produkto jam atingis sian kulminon". Tamen, la vastaj amasoj de karboministoj kaj oficistoj firme praktikis la ĝustan principon faritan de la Partio plene liberigi la latentajn fortojn de la malnovaj minejoj, por ilin reformi kaj disvolvi.

En tiu batalado, Anjuan-karbominejo de la Pinghiang-a Karbomina Administrejo de Gianghi-provinco kreis novan situacion. Tiu ĉi minejo funkciis jam pli ol 70 jarojn. Iuj opiniis, ke la ora tempo de Anjuan-karbominejo jam forpasis kaj estos ne plu disolvebla. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, en la minejo organiziĝis karbo-serĉa grupo de laboristoj, teknikistoj kaj kadroj. Ili okazigis enketajn kunsidojn, faris galeriajn pros-

pektoradojn, studis kaj analizis la historian materialon de siaj ŝaktoj. La plenampleksa enketado konfirmis ĝian pligrandan ekspluateblan karbofonton, kio longigis la vivon de ŝaktoj, kaj pretigis materialan kondiĉon por grandskale pliprodukti karbon. En la jaro 1971, la produktokvanto de karbo atingis pli ol 900,000 tunojn, t.e. 2-oblo de tiu projektita de la minejo.

Post kritiko de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la alta tajdo de amasa liberigo de latentaj fortoj kaj pliprodukto aperis sur la fronto de karba industrio. En multaj malnovaj karbominejoj oni reformis malnovajn ekipaĵojn, teknologion kaj produktajn metodojn, fortigis mekanikigon en ekspluatado. En iuj malnovaj minejoj oni konstruis ŝakton milmetran por ekspluati pliprofundan karbotavolon. Jam reviviĝis multjare fermitaj ŝaktoj, kaj rejuniĝis "velkintaj" minejoj. Ekzemple, la produktokvanto de la karbominejoj Kajluan kaj Ginghing de Hejbej-provinco, Fuŝun, Benhi kaj Fuhin de Liaŭning, Datong de Ŝanhi, Giaŭzuo de Henan kaj Zibo de Ŝandong kaj aliaj jam multe superis la projektitan produktan kapablon. Tiuj malnovaj minejoj jam fariĝis kernaj fortoj de nia karba industrio.

RAPIDA KONSTRUADO DE NOVAJ KARBOMINEJOJ

Dum la rapida disvolviĝo de la malnovaj minejoj, nia lando ankaŭ konstruis novajn minejojn por ekspluati nove trovitan karbominon. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj, niaj prospektoroj, subtenate de la popolamasoj, trovis multajn novajn karbokampojn kun grandkvanta rezervo. Kun la pligrandiĝo de la subtera karba rezervo, prospere disvolviĝas la konstruado de karbominejoj. En la tuta lando konstruiĝis 863 grandaj kaj mezgrandaj karbaj ŝaktoj, el kiuj 771 estas konstruitaj post la jaro 1958. Multaj novaj minejoj jam havas rimarkindan skalon kaj formis novajn bazojn de karba industrio. En la pasinteco la provincoj Siĉuan, Junnan kaj Gujĝoŭ produktis malmultan karbon, sed en 1971 ilia karba produktokvanto atingis 2.5-oblon de tiu de 1957. Kaj en Tibeto, kiu neniam produktis karbon en la pasinteco, konstruiĝis malgrandaj karbominejoj.

Krom iuj grandaj minejoj, oni konstruis ankaŭ multajn malgrandajn karbominejojn en diversaj lokoj. Longdong-karbominejo jare produktas 210,000 tunojn da karbo. Sub la gvido de la loka partia komitato, lerninte la sperton de Daking,

ĝi koncentris homajn kaj materiajn fortojn en konstruado de la minejo. Post konstruado de 105 tagoj, ĝi komencis produktadon. En tiu jaro ĝi jam atingis la projektitan kapablon kaj ĝustatempe provizis la lokan industrion per bonkvalita karbo. Iuj entreprenoj ĉiurimede aplikis novan teknikon kaj altiĝis mekanikigan nivelon por rapidigi la konstruadon.

La rapida disvolviĝo de karbomineja konstruado akcelis la revolucion en ĝia projektado. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri konduko de amasa movado de projektado, la projektistoj profundigis en produktan kaj konstruan frontojn kaj faris projekton laŭ lokaj kondiĉoj por pli bone servi al produktado kaj konstruado. En 1971, por plibonigi la projektadon de karbolavejo, iu projekta institucio de karbominejoj kune kun produktaj kaj konstruaj unuoj enketis pli ol 20 karbolavejojn. Post tio ili koncentris la progresintajn teknikojn de tiuj karbolavejoj kaj ellaboris 6 malsamajn projektojn. La senĉesa disvolviĝo de nia karbomineja projektistaro kaj altiĝo de scienca kaj teknika nivelo ankoraŭ pli forte antaŭenpuŝis la konstruadon de karbominejoj.

DISVOLVIĜO DE LA KARBA INDUSTRIO SUDE DE JANGZI-RIVERO


Antaŭ la Liberiĝo, por rabi maksimuman profiton, la imperiistoj formis nenormalan disvolviĝon de la karba industrio de nia lando. Ili konstruis karbominejojn plejparte en nia nordo kaj ĉiurimede dissemis la teorion ke “ne troviĝas karbo en la Sudo de Jangzi-rivero”, kio serioze baris la disvolviĝon de la karba industrio de tiu regiono. Dum la longa tempo, la Nordo devis provizi la Sudon de Jangzi-rivero per karbo.

En la jaro 1958, sub la direktado de la ĝenerala linio de la Partio, relative granda disvolviĝo troviĝis en la karba industrio en la Sudo de Jangzi-rivero. Post la Granda Proletara Kultura Revolucio, partiaj organizoj kaj revoluciaj komitatoj de la diversaj niveloj en tiu regiono plenumis la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri disvolvo de karba industrio de la Sudo de Jangzi-rivero kaj rapide disvolviĝis amasa movado de serĉado de karbo kaj starigo de minejoj. Oni trovis karbon en la sudorienta regiono apud-

Laboristoj de Kajluan-karbominejo de Hebej-provinco fosas karbon per kombajno.



*Laboristoj de Hong-
vej-karbominejo de
Liaŭning-provinco ri-
paras ducilindran vin-
ĉon.*



mara kun t.n. “fortaj terenfaldoj kaj rompitaj tertavoloj”, delonge rigardata kiel loko malabunda je karbo, kaj ĝin trovis ankaŭ en orienta Ĝegiang, suda Gianghi, Fugian kaj Guangdong, abundaj je fajraj rokoj kaj ruĝaj tertavoloj. En la jaro 1970, la trovita karba rezervo de Ĝegiang-provinco superis la totalan kvanton de karbo trovitan en la pasintaj 20 jaroj; pli ol 60 gubernioj de Hubej-provinco jam trovis karbon; kaj ankaŭ Fugian-provinco trovis multajn karbofontojn, inter kiuj unu minejo rezervas kelkcent milionojn da tunoj da karbo.

En la amasa movado ekspluati karbominon, elirante de siaj konkretaj kondiĉoj de la riĉfonto kaj homa, materia kaj financa fortoj, la provincoj en la Sudo de Jangzi-rivero starigis laŭplane nombron da relative grandaj minejoj kiel bazon por disvolvi la lokan karban industrion, kaj samtempe mobilizis la amasojn por starigi malgrandajn minejojn. Guangdong-provinco konstruis ne nur relative

grandajn minejojn kiaj Mejtian kaj Sivangĝang, sed ankaŭ multe da malgrandaj karbofosejoj. Ĝia Nanhaj-gubernio jam konstruis 3 malgrandajn ŝaktojn kaj pli ol 60 malgrandajn karbofosejojn kaj ankaŭ ĝia Jangŝan-gubernio starigis pli ol 100 malgrandajn karbofosejojn. La produktokvanto de karbo de la provinco kreskis rapide kaj tiu de 1971 estis 100-oblo de tiu de 1949.

Post energia klopodo de la lastaj jaroj, en la provincoj en la Sudo de Jangzi-rivero konstruiĝis dekmiloj da malgrandaj karbofosejoj. La karba produktokvanto de tiu regiono en 1971 estis pli-ol-2-oblo de tiu de 1960. Iuj provincoj povas fundamente sin provizi per karbo kaj aliaj multe altigis sian memprovizan kapablon. Jam por ĉiam forpasis la tempo, ke popolanoj en multaj lokoj de tiu regiono loĝis apud karbomino generacion post generacio, tamen mankis al ili karbo por hejtado.



Vang Hiliang

Naskiĝo de Universala Draŝmaŝino

GIN VEN

EN la Printempa Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en Kantono en 1972, iu draŝa-ventuma maŝino kun la marko Dongfanghong altiris al si la atenton de vizitantoj. Ĝi estas malgranda, malpeza kaj bone efika pro apliko de ventuma metodo en purigado de draŝita greno anstataŭ la tradicia. Ĝi povas draŝi tritikon, rizon, maizon, sorgon kaj aliajn grenojn kaj ankaŭ distranĉi fojnon.

La novtipa maŝino estas kreita de Vang Hiliang, laboristo de la Fabriko de Agrikulturaj Instrumentoj de Vanĵong-gubernio, Ŝanhi-provinco, kune kun siaj kamaradoj, post 217 eksperimentoj.

Vanĵong-gubernio abunde produktas tritikon. En la pasinteco, la draŝmaŝinoj uzataj de la produktaj grupoj povis nur draŝi, sed ne purigi. Kiam draŝita tritiko amasiĝis dum kelkaj tagoj pro nebleco de ventumo, ĝi varmiĝis. Ĉiufoje, kiam Vang Hiliang vidis tian aferon, li tre maltrankviliĝis. Li pensis: La manko de grenpurigaj rimedoj montras, ke ni ne sufiĉe bone subtenas agrikulturon. Li decidis fari ventuman maŝinon por solvi la problemon.

Kian ventuman maŝinon li faru do? Iu proponis kopie fari fremdlandan kompleksan draŝmaŝinon. Tia maŝino havas 9 kribriilojn, tri ventolilojn, komplikan strukturon kaj kolosan korpon. Ĝi ne taŭgas por uzado en nia kamparo. Vang Hiliang pensis: Se la Daking-anoj sukcese konstruis Daking-petrolkampon sur la senŝirma stepo en tri jaroj, ĉu ni tamen ne povas krei maŝinon por draŝado ka purigado taŭgan por uzado en nia

agrikulturo? Li diris sian ideon al kamaradoj por interkonsiliĝo, kaj la lastaj diris: "Por fabriki novan maŝinon por nia agrikulturo, ni devas iri nian propran vojon de disvolvado de industrio laŭ la ekzemplo de la Daking-anoj."

Por krei novan vojon, Vang Hiliang kaj liaj kamaradoj vizitis multajn lokojn por enketo, esploro kaj lernado de necesaj scioj.

Iutage, kiam Vang Hiliang revenis survoje post riparo de maŝinoj en kamparo, turnovento blovis preter li, levante foliojn en la aeron kaj ŝutante sablerojn en lian vizaĝon tiel forte, ke la vizaĝo ekdoloris. Tio donis al li bonan sugestion. Li pensis: se maŝinoj de kemia fabriko povas per aerfluo disigi mineralajn grajnoj de minerala pulvoro anstataŭ kribriiloj, ĉu oni ne povas fari maŝinon, kiu povas draŝi kaj purigi tritikon levante pajlerojn, ŝelojn, tritikajn grajnoj kaj aliajn ĝis malsamaj altecoj per aerfluo? Li interkonsiliĝis kun siaj kamaradoj. Ĉiuj opiniis, ke lia rezono estas prava kaj la gvidantoj subtenis ilian proponon pri eksperimentado. Ili prove elfaris la unuan maŝinon. Prova uzo montris, ke ĝi povas elekti ĉ. cent kilogramojn da greno en ĉiu horo. Sed Vang Hiliang ne malesperiĝis. Post plurfoja rebonigo, ili levis ĝian kapablon ĝis 750 kilogramoj en ĉiu horo.

Kvankam la maŝino povis fundamente apartigi grenon, ŝelon, pajlon kaj aliajn objektojn, tamen en la ŝelo miksiĝis iometo da greneroj. Iuj proponis tuj komenci pogranda produkton de tia maŝino, tamen Vang Hiliang pensis, ke estos bone

por la ŝtato, se la maŝino povos tute apartigi la grenon de la ŝelo. Li faris kalkuladojn kune kun siaj kamaradoj kaj konstatis, ke la tuta gubernio perdos ĉiujare centojn da tunoj da tritiko, se ĉiu maŝino perdos ĉ. ducent kilogramojn da tritiko. Tio surprizis ilin kaj ili decidis daŭrigi sian eksperimentadon por ne miksi grenon en ŝelon.

Prezidanto Maŭ diris: “Se oni volas sukcesi en sia laboro, t.e. atingi la antaŭkonceptitajn rezultojn, oni nepre devas konformigi siajn pensojn al la leĝoj de la objektiva ekstera mondo; alie oni malsukcesos en praktiko.” Vang Hiliang pensis, ke la enmiksiĝo de tritikaj grajnoj en la ŝelo montras, ke eble la antaŭa aranĝo ne konformis al la movada leĝo de la aerfluo. Por bone koni la movadan leĝon de la aerfluo, li kaj liaj kamaradoj malfermis giĉeton sur la apartigilo. Sed tra tiu truo ili povis vidi nur parton de la fenomenoj de la aerfluo en movado. Vang Hiliang iel etendis sian kapon en la truon por koni la movadan leĝon de la aerfluo per vido kaj tuŝado. Laŭ la rezulto de sia esploro, ili ĝustigis la direkton de la aerflua movado, reguligis ĝian fortecon kaj fine efektivigis perfektan apartigon de greno kaj ŝelo per la maŝino.

Post la sukcesa fabriko de la draŝa-ventuma maŝino, Vang Hiliang iris al iu brigado por prova uzado. Komunumanoj diris: “Ĉiujare, la rikolto de tritiko daŭras nur kelkajn tagojn kaj tia maŝino fariĝas senutila post la rikolto. Estus bone, se ĝi povus ankaŭ distranĉi fojnon!” La proponoj kaj postuloj de la komunumanoj inspiris kaj kuraĝigis Vang Hiliang, kaj li komencis provadon por fari la maŝinon taŭga por pluraj uzoj.

Por elekti taŭgan tipon, Vang Hiliang kaj liaj kamaradoj faris ripetadan eksperimenton pri klinga fojnodistranĉa maŝino kaj trovis ke la klingo facile difektiĝas de frotado, la distranĉaĵoj estas neegale longaj, la laborefiko malalta kaj la manipulado nesekura. Poste, li trovis ke fojno-dispeciga maŝino laboras kun alta laborefiko, bona kvalito kaj sen bezono de klingo. Ĝia manko estas, ke ĝi ofte obstrukciĝas kaj la enmetado de fojno al ĝi estas malsekura. Ili rebonigis la maŝinon por elimini la difekton, sekurigis kaj glatigis ĝian funkciadon utiligante iujn partojn de la draŝmaŝino. Post duonjara klopodado, fine ili kontentigis la postulon de la vasta komunumano pri maŝino por pluraj uzoj.

Nun la draŝaj-ventumaj maŝinoj produktitaj de tiu fabriko jam estas liveritaj al multaj komunumoj de nia lando kaj ili estas tre ŝatataj de la kamparanoj.



Laboristo Vang Hiliang (la dekstra en la fronto) ekzamenas draŝmaŝinon.

Vang Hiliang petas opiniojn de kamparanoj.



Ministo — Inĝeniero

ANTAŭ 27 jaroj, en vintro de la malnova norda Ĉinio iu malriĉa juna kamparano kun siaj edzino kaj infanoj venis de vilaĝo kelkdek kilometrojn fora al Kajluan-karbonejo por labori kiel ministro. Li estas neniŭ alia ol Oŭjang Giĥiu, inĝeniero de la filia minejo Fangeĝuang de Kajluan-karbonejo.

Kiam ni vizitis lin, la 47-jara Oŭjang Giĥiu estis diskutanta kun iu grizhara maljuna inĝeniero pri plano. Vidinte nin, li klarigis varme: “Nun ni desegnas planon pri ekspluato de profundaj karbotavoloj. Post plena diskutado de gvidantoj, laboristoj kaj teknikistoj la projekto jam estas decidita kaj la gvidantoj postulas, ke ni plenumu la desegnadon kiel eble plej rapide.”

Laŭ nia peto, li rakontis al ni pri sia amara travivaĵo de ministro antaŭ la Liberiĝo. En Kajluan-karbonejo regata de imperiismo, li multe suferis skurĝadon kaj bastonadon de kapitalistoj, policanoj kaj feŭdaj laborĉefoj. Ĉiutage, li laboris kune kun aliaj ĉinaj ministroj dekelkajn horojn en galerio simila al infero, tamen ne povis vivteni sian familion per la salajro. En la dua jaro post kiam li eklaboris kiel ministro, liaj edzino kaj du infanoj mortis unu post alia pro malsato kaj malsano. Post tio li solece baraktis 4 jarojn en Kajluan-karbonejo en la malnova Ĉinio.

Je la fino de 1948, Kajluan liberiĝis. Sub la gvido de la Komunista Partio, en Kajluan-karbonejo arde disvolviĝis movado de demokratia reformo. Kun forta malamo al la klasaj malamikoj, Oŭjang Giĥiu decideme batalis kontraŭ naciperfiduloj kaj feŭdaj laborĉefoj, kiuj kruele subpremis kaj ekspluatis ministrojn. En la revolucia batalo rapide leviĝis lia klasa konscio. En 1952 li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj fariĝis avangarda batalanto de la proletaro.

Vintre de tiu jaro, respondeculo de la partia organizo venigis Oŭjang Giĥiu kaj diris al li, ke bal-

daŭ komenciĝos alta tajdo de grandskala ekonomia konstruado de la patrolando kaj ankaŭ Kajluan-karbonejo multe disvolviĝos. Pro tio nombro da laboristoj estos sendita al universitatoj por studo. Li diris ankaŭ, ke la partia organizo jam decidis sendi lin al la Pekina Minerala Instituto por lerni. Surprizite Oŭjang Giĥiu kun dubo demandis: “Lerni en instituto! Ĉu kompetentas mi karbofosisto malrespektata en la malnova socio?” La respondeca kamarado varme kuraĝigis lin. Post nelonge, kun emocia koro li eniris la nomitan instituton kaj eklernis en prepara fako. La pli ol 60 lernantoj en tiu fako ĉiuj estis veteranaj laboristoj kaj bazaj kadroj elektitaj de la karbonejoj Fuŝun, Datong kaj aliaj.

Parolante pri sia studa vivo, Oŭjang Giĥiu diris: “Se ne estus ĝustatempa helpo kaj edukado de la partia organizo, mi delonge eksiĝus el la instituto.” En sia knabeco li vizitis lernejon nur kelkajn monatojn. Post la Liberiĝo, kvankam li akiris iom da legoscio en la laborista postlabora lernejo, tamen lia klereco estis malalta. Pro malfacileco en la lernado aperis en lia kapo ideo reiri al la minejo. Sciinte tion la partia organizo donis al li ĝustatempan helpon. Li diris memorante pri tio: “Antaŭvespere de 1952, respondeculo de la partia filio de nia kurso, kiu estis veterana laboristo sate suferinta subpremadon kaj ekspluaton en la malnova socio, faris kun mi korverŝan interparolon. Li sincere diris al mi: ‘Kamarado Giĥiu, la Partio sendis nin al la instituto ja por kulturi nin en teknikajn kadrojn de la laborista klaso mem. Ni lernas komisie de la klaso, kaj ni nepre devas venki la malfacilojn kaj persisti ĝis la fino.’ La intima kaj sincera parolo de la respondeculo firmigis mian memfidon kaj de tiam mi lernis ankoraŭ pli diligente. Nokte, kiam kunlernantoj jam dormis, mi ankoraŭ lernis. Dum ferioj, anstataŭ hejmeveni mi restis en la instituto por lerni plue. Instruistoj kaj kunlernantoj ĉiamaniere min helpis, tiel ke mi plenumis la taskon de la studo.”



En 1954, li komencis lerni en karbofosa fakultato. En tiu studo li renkontis ankoraŭ pli multajn malfacilojn. Tamen li atingis bonan sukceson en lernado pro sia riĉa praktika sperto kaj diligenteo kaj estis elektita kiel elstara studento.

En 1958, en la alta tajdo de la granda antaŭensalto Oŭjang Gihiu diplomiĝis el la instituto kaj revenis al Kajluan-karbominejo. Komence li laboris kiel antaŭe en ŝakto. Poste, kvankam li fariĝis teknikisto, li tamen konstante partoprenis en fizika laboro. Dum laborado li klopodis kombini teorion kun praktiko kaj modeste lernis de veteranaj laboristoj kaj inĝenieraj teknikistoj. Post kelk-jara praktiko multe leviĝis lia politika konscio kaj teknika nivelo kaj pro tio estis promociita kiel karbofosa inĝeniero. Oŭjang Gihiu diris: "En la tuta minejo estas kelkdek inĝenieroj, kiuj estis promociitaj, kiel mi, el ministoj. 90% de la diversnivelaĵ gvidantaj kadroj de la minejo devenas de laboristoj, tio estas ja neimagebla afero antaŭ la Liberiĝo."

En 1964, la granda kaj moderna Fangeĝuang-minejo projektita kaj konstruita de nia lando mem komencis produktadon. La partia organizo sendis Oŭjang Gihiu tien por labori kiel karbofosa inĝeniero. Li ofte iris en ŝakton por fari esploradon. Por mildigi la laborintensecon de laboristoj, li cerbumis por reformi transportan maŝinon en karbofosado. Dum longa tempo, laboristoj devis unue

malmunti tiun maŝinon por facile movi ĝin antaŭen parton post parto kaj poste ĝin remunti. Tiamaniere oni malŝparis ne nur forton sed ankaŭ tempon. Post ripetada interkonsiliĝo kun koncernaj kamaradoj Oŭjang Gihiu projektis glitigan aparaton kaj per tio efektivigis movon de la tuta maŝino sen malmuntado, tiel ke altiĝis la laborefikeco je 40% kaj multe mildiĝis la laborintenseco de la ministoj. Tiu renovigo rapide disvastiĝis en Kajluan kaj aliaj karbominejoj de la tuta lando.

En la granda kultura revolucio Oŭjang Gihiu estis elektita kiel membro de la revolucia komitato de Fangeĝuang-minejo kaj respondecis pri la tuta tekniko de la minejo. Li kun laboristoj sukcesis en aliaj teknikaj renovigoj. Unu el ili estas nova metodo de sekura administrado de tegmento.

En iu tempo ofte okazis en galerio danĝeraj kazoj de falado de galeria plafono, kio serioze minacis la sekurecon de la laboristoj. Oŭjang Gihiu, kiu hazarde postvivis akcidenton de plafono-falo antaŭ la Liberiĝo, profunde komprenis, ke zorgo pri sekureca produktado de laboristoj estas unu el la distingajoj inter socialisma kaj kapitalisma entreprenoj. Garantii sekurecon de laboristoj estas grava devo de la inĝenieroj de la nova Ĉinio. Por nuligi faladon de plafono, li laboris kune kun laboristoj pli ol unu monaton en galerio por observi geologian ŝanĝiĝon kaj movan leĝon de la plafona rok-

tavolo. Li faris skizon laŭ mekanika teorio kaj klarigis al laboristoj pri la kaŭzo de la plafono-falo por ke ĉiuj ĝin konu kaj konkeru. Poste li kune kun laboristoj resumis novan metodon de sekura administrado de plafono. Ekde 1966, per tiu metodo oni ekspluatis 14 laborspacojn kaj ne plu okazis tia akcidento.

En la lasta jaro, kune kun amasoj li plibonigis la metodon de fosado de la 7-a kaj 8-a karbotavoloj. Inter tiuj du tavoloj estis ŝtontavolo kun dikeco de malpli ol 1 metro. En la pasinteco oni prenis tiujn du karbotavolojn kiel unu tutan tavolon kaj fosis karbon per la metodo de artefarita plafono, kio kaŭzis malbonan kvaliton de karbo kaj grandan konsumon de materialoj. En ripetada praktikado Oŭjang Gihui rimarkis, ke kvankam la ŝtona tavolo estas maldika tamen fortika kaj opiniis, ke sen movo

de la ŝtona tavolo oni povas fosi du tavolojn de karbo unu post la alia. Post multfoja esplorado, oni aplikis tiun metodon. Dank' al tio oni malaltigis la maldikecon de karbo je 10%, malmultigis la konsumon de materialoj, reduktis la memkoston je 13% kaj iom altigis la produktokvanton.

Nun Oŭjang Gihui kune kun laboristoj eksperimentas pri nova tekniko. Kiam ĵurnalistoj laŭdis lin pro lia grava kontribuo al la ŝtato kaj popolo, li diris: "Mi ne meritas laŭdon. Nun la socialisma konstruado de la patrolando progresas tagon post tago, karba industrio multe disvolviĝos kaj ankaŭ nia Fangeĝuang-minejo disvastiĝos. Mi profunde konsciiĝis, ke mia tasko estas peza, tamen mia kapablo limigita. Estonte mi devas ankoraŭ pli diligente studi kaj labori por pli bone plenumi mian taskon asignitan de la Partio kaj popolo."

Oŭjang Gihui faras projektadon kune kun laboristoj kaj teknikistoj.



Veterana Ruĝarmeano

Ĝaŭ Gincaj

EN la urbo Fuhin de Liaŭning-provinco estas veterana eksruĝarmeano Ĝaŭ Gincaj. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, li memvole elektis por si ordinaran kaj malfacilan laboron de karbofosado en Gaŭde-minejo. En la pasintaj pli ol dek jaroj, li ĉiam konservis la revolucian spiriton de veterana ruĝarmeano peneme lukti en malfaciloj, sinforgese laboris por la socialisma konstruado kaj pro tio estis varme laŭdata de amasoj.

NE HALTI SUR LA REVOLUCIA VOJO

Ĉijare Ĝaŭ Gincaj estas 53-jara. En julio de 1936 li, 17-jara bovpaŝtisto, aliĝis al la Ĉina Laborista kaj Kamparana Ruĝa Armeo en sia hejmloko Lihian-gubernio, Gansu-provinco, kaj venis al norda Ŝenhi sekvante la Partion kaj la Ruĝan Armeon. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-1945), li brave luktis sur multaj batalkampoj kaj poste li sin okupis pri gardado en Jan-an. En tiuj tagoj li dufoje vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj propraoarele aŭskultis liajn intimajn instruojn. En 1939, li glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en la limregiono. En la granda produkta kampanjo en Nannivan, kiel membro de la 359-a brigado de la Okavoja Armeo, li ekspluatis virgan teron kaj faris lignokarbon en monto. En la jaroj de la Liberiga Milito (1946-1949), li partoprenis en Liaŭhi-Ŝenjang-a kaj Pekin-Tiangin-a Kampanjoj, batalis spite al morta danĝero, grave vundiĝis kaj faris sian kontribuon al la revolucio.

En decembro de 1949, Ĝaŭ Gincaj, kiu fariĝis vicrotestro, demobiliziĝis pro malsano kaj iris al iu loko por tie ricevi kuracadon kaj fari konvenan facilan laboron. En 1954, sub la direktado de la ĝenerala linio de la Partio por la transira periodo, ĉie regis prospero en nia juna socialisma patrolando. Ĝaŭ Gincaj ne plu povis trankvile ripozi hejme. Li ripetade pensis pri la instruo de Prezidanto Maŭ farita antaŭvespere de la Liberiĝo: **“Gajni la tutlandan venkon estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dekmil lioj, la vojo post la revolucio estos pli longa, la laboro pli grandioza kaj pli peniga.”** Kiam li fartis iom bone, li petis, ke oni donu al li pli da laboroj.

Iun tagon, Ĝaŭ Gincaj venis al fervoja stacio. Rigardante forveturantajn trajnojn plensarĝitajn per karbo, li ekmemoris la militajn jarojn...

Estis la jaro 1943. En la granda produkta kampanjo en norda Ŝenhi, Ĝaŭ Gincaj fondis malgrandan munician fabrikon kune kun siaj kunbatalantoj. Mankis al ili fero kaj ŝtalo, ili do ĉie kolektis eluzitajn feraĵojn kaj ŝtalaĵojn transgrimpinte montojn de la mateno ĝis la vespero; mankis al ili karbo, ili do ĉiutage transportis ĝin dufoje de loko fora je dekoj da kilometroj per azeno. Dum la transportado de karbo, la vizaĝo kaj manoj de Ĝaŭ Gincaj estis kovritaj de karbopulvoro kaj soldatoj ŝerce diris al li: “Kamarado subplotonestro ja similas al karboministo.” Ridante Ĝaŭ Gincaj diris: “Post liberiĝo de la tuta lando, mi certe laboros kiel karboministo por elfosi multe da karbo por konstruado de la patrolando.”

Informiĝinte, ke Gaŭde-karbominejo varbas ministrojn, li decideme petis permeson fariĝi karboministo.

Timante, ke lia malfortika korpo ne taŭgas por tiu laboro, iu diris al li: “Maljuna Ĝaŭ, fosadi karbon en galerio estas tre malfacile kaj penige, via sano estas ne tiel forta, do faru alian laboron!”

Ĝaŭ tamen firme diris: “Kiel povas ne troviĝi malfaciloj en revolucio? Ni komunistoj laboras ja por venki malfacilojn!”

NENIAM FORGESI LA REVOLUCIAN TRADICION

Post veno al Gaŭde-karbominejo, Ĝaŭ Gincaj ĉiam restas modesta kaj singardema kaj timas neniam malfacilojn en laboro.

Ĝaŭ Gincaj loĝas en antaŭurbo. Kvankam lia hejmo distancas malproksime de la minejo, tamen li ĉiam frue iras al laboro kaj malfrue revenas al la

hejmo. Iun matenon, furiozis fulmotondro. Lia edzino zorge admonis lin: “Hodiaŭ tiel pluvegas, do vi ne iru al laboro!” Ĝaŭ tamen respondis: “Ni sentas malsaton se ni ne prenas eĉ unu manĝon. Karbo estas greno de industrio, se oni ne produktas karbon en unu tago, tio malfaciligas industriajn produktadon. Dum la Longa Marŝo, la Ruĝa Armeo akiris venkojn unu post alia malgraŭ ke malamikoj ĝin baris, persekutis kaj bombadis. Kompare kun tio la pluvo estas nemenciinda.” Tion dirinte li malaperis en la pluvo. Kotoplena li enpaŝis la pordon de la minejo kaj haste demandis: “Ĉu mi ne malfruiĝis?” Vidante lin tramalsekigita iu laboristo ameme diris: “Ankoraŭ frue! Kial vi ne atendas ĝis malgrandiĝo de la pluvo? Jen kiel vi malsekiĝis!” Ĝaŭ serioze diris: “Ni laboristoj devas bone observi la disciplinon de la minejo.”

Fosi karbon en galerio estas relative peniga laboro. Ĝaŭ Gincaj opinias, ke oni ne timas penadon, nur se oni ofte penas; kaj oni povas revolucii



Ĝaŭ Gincaj interparolas kun laboristoj.

nur se oni povas penadi. Se oni pensas nur pri ĝuado, oni forgesos revolucion.” Li ĉiam restas energioplena kiel en la revoluciaj militaj jaroj. Ŝargado de transportilo estas la plej peniga laboro en galerio, li do memvole prenis sur sin tiun laboron. Dum certa tempo en galerio stagnis multe da akvo kaj ne sufiĉis subteniloj, kio malbone influis la produktadon. Ĉe tio Ĝaŭ Gincaj elpaŝis kaj kune kun aliaj laboristoj prenis sur sin la taskon de transportado de subteniloj. Iun tagon, kiam laboristoj vigle laboris, aperis danĝero de rok-falado. Laboristoj rapide retiriĝis al sekura loko. Post kalkulo, Ĝaŭ Gincaj rimarkis ke iu kamarado ankoraŭ ne venis. Ĉiuj konkure sin anoncis por lin serĉi, tamen Ĝaŭ ilin baris dirante: “Ne, nur unu homo povas eniri.” Tion dirinte li sola sin ĵetis en la danĝeran lokon kaj trovis tiun kamaradon en iu angulo. Tiu estis nova ministro. Ĉar mankis al li sperto, li ne trovis vojon por reiri pro rompiĝo de sia minlampo. Ĝaŭ tuj helpis lin forrapidi de la danĝerejo kaj evitigis al li akcidenton.

Tiu veterana ruĝarmeano elprovita de milito neniam fieris pro siaj meritoj. Kien li iras, tien li portas la revolucionan tradicion de la Ruĝa Armeo; kaj kie li estas, tie li rakontas pri heroaĵoj de la Ruĝa Armeo kaj Okavoja Armeo, tiel ke la vasta amaso ricevas konkretan kaj vivan edukon de la revolucia tradicio. En la kuna laborado iuj laboristoj demandis: “Maljuna Ĝaŭ, ĉu vi ne estis ruĝarmeano? Alie, kiel vi sciigis pri tiom da rakontoj?” Kun rido Ĝaŭ diris: “Mi servis kiel soldato nur kelkajn tagojn, ĉio kion mi diris estas farita de niaj revoluciaj antaŭuloj.”

Foje, en kunveno de laboristoj kaj oficistoj gvidanto diris al ĉiuj la historion de Ĝaŭ Gincaj. Nur tiam oni eksciis, ke tiu diligenta ministro estis veterana ruĝarmeano. Tio multe emociis la laboristojn.

ĈIAM ESTI ORDINARA LABORULO

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, li aktive partoprenis en klasa batalo, firme tenis revolucion kaj stimulis produktadon kaj insistis pri ŝparemo en revoluciado. Hardite kaj elprovite de la revolucio li estis elektita kiel konstanta membro de la revolucia komitato de la minejo. Altiĝis lia rango, tamen ne ŝanĝiĝis lia laborstilo strikte ligiĝi kun amasoj kaj partopreni en fizika laboro. Krom ĉeesti kunvenojn de la minejo li persistas en laboro en galerio. En la pasinta Prin-

tempa Festo, li partoprenis en konsola taĉmento por subteni la armeon kaj bonzorgi iliajn familiajn organizita de la provinco. Ĵus reveninte al Fuhin li rekte rapidis al la minejo, ŝanĝis siajn vestojn je laborkostumo kaj iris en ŝakton.

Konsiderante ke li estas gvidanta kadro kaj vundiĝis en la pasinteco, la gvidantoj decidis asigni al li iom facilan laboron eksterŝaktan anstataŭ labori en galerio. Tamen Ĝaŭ laboris en galerio jam dekelkajn jarojn kaj li bone konis kaj tre amis ĝin, tial li neniel volis forlasi ĝin. La gvidantoj fine asignis al li iun facilan laboron de kontrolisto pri sekuro en galerio. Por certigi sekurecon de la laboristoj li faris ĉiun eblan klopodon. Sur la 100 metrojn longa laborspaco kun dekliveco de 30 gradoj ĉiutage li iris kaj reiris multajn fojojn por atente kontroli ĉiun subtenilon kaj la tutan tegmenton. Se iu subtenilo kliniĝis, li tuj ĝin rektigis; se mankis subtenilo en iu loko, li tuj ĝin aldonis; se sur tegmento estis malkompakta karbopeco, li ĝin defosis per pioĉo. . .

Timante, ke tia laboro lacigos Ĝaŭ Gincaj, gvidantoj asignis al li post pli ol unu monato alian laboron direkti transportilon per elektra butono. Li amas la maŝinon, kiel batalanto sian armilon. Dank’ al lia zorgado la maŝino estas ĉiam brile purigita kaj neniam okazis al ĝi akcidento. Laboristoj laŭdis: “Maljuna Ĝaŭ faras ĉiun ajn laboron kun diligenteco.”

Ĝaŭ Gincaj estas rigora ne nur al si mem, sed ankaŭ al siaj familianoj. Post kiam lia plejaĝa filo diplomiĝis el la mezlernejo, li pensis, ke lia patro estas veterana ruĝarmeano. Nur se la patro diros lian deziron al koncerna gvidanto, li povos labori en urbo. Tion sciinte, Ĝaŭ Gincaj serioze diris al sia filo: “Gingbaŭ, via patro estis ruĝarmeano kaj estas laboristo, vi devas aktive respondi la alvokon de Prezidanto Maŭ kaj iri al kamparo por vin hardi.” Dank’ al eduko de la patro lia filo iris al kamparo.

La loĝejo de Ĝaŭ Gincaj estas ne sufiĉe vasta kaj pro tio la gvidantoj plurfoje proponis ŝanĝi por li loĝejon. Tamen li diris sincere: “Mia loĝejo estas multe pli bona ol kaverndomo en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Malvasteco de la domo ne influas mian revoluciadon.” Li insistis ke aliaj laboristoj transloĝu en la vastan domon. Laboristoj diris kortuŝite: “Kamarado Ĝaŭ estas veterana ruĝarmeano kaj komunisto, tamen li neniam postulas privilegion en la vivo. Lia revolucia spirito strikte ligiĝi kun la amasoj kaj peneme lukti en malfaciloj estas lerninda por ni!”



Vizito al la Ziginŝan-a Observatorio

LA Ziginŝan-a Observatorio estas fondita en 1934. Ĝi troviĝas sur la monto Ziginŝan de Nankino, Giangsu-provinco.

Antaŭ la Liberiĝo, la Ziginŝan-a Observatorio estis nur ornamaĵo de la kuomintanga reakciularo. Tiam mankis al ĝi necesa mono kaj ekipaĵoj. Ĝi havis nur ĉ. dek laborantojn kaj du teleskopojn, kiuj tamen ne estis oficiale uzataj, por ne paroli pri farado de observaj kaj esploraj laboroj.

Post la Liberiĝo, kun la disvolviĝo de la nacia ekonomio de nia lando, la Ziginŝan-a Observatorio senĉese grandiĝis kaj fariĝis pli bone ekipita. La plejmulto de ĝiaj nunaj laborantoj estas elkul-

Foto pri suna erupcio farita de la observatorio



Astronomo Ĝang Juĝe, kiu sin okupis pri astronomio jam 40 jarojn.

turitaj en la nova Ĉinio; konsiderinde granda parto de ĝiaj ekipaĵoj estas projektita kaj fabrikita de nia lando mem.

La esplora kampo de la Ziginŝan-a Observatorio estas senĉese vastigata kaj sistemigata. Ekde la jaro 1958, oni komencis esplori krom sunmakuloj ankaŭ la spektron, kromosferon kaj radoradiadon de la suno kaj sisteme studas ĝian aktivadon kaj ĝian influon al la geofizikaj fenomenoj.

Ĉiufoje kiam leviĝas la suno, la laborantoj de la Ziginŝan-a Observatorio komencas observi kaj registri la diversajn aktivadojn de la suno kaj faris fotojn pri sunaj erupcioj. En noktoj, kiam brilas steloj, iuj el la laborantoj de la observatorio serĉas per teleskopo netrovitajn asteroidojn, aliaj esploras la tempon kiam fiksj steloj trapasas la kulminon por mezuri la precizan tempon, ankoraŭ iuj atendas la aperon de kometo laŭ la kalkulita periodo kaj orbito. La du kometoj malkovritaj de ili en 1965 estis nomitaj Ziginŝan N-ro 1 kaj Ziginŝan N-ro 2, kaj en la komenco de la kuranta jaro, oni faris esploradon pri ili. En la lastaj jaroj, per la katadioptrika teleskopo projektita kaj fabrikita de nia lando tiu observatorio plurfoje observis la rotaciadon de niaj artefaritaj ter-satelitoj. Kaj krome, ili ankaŭ redaktis astronomian kalendaron kaj per tio rekte servas al la nacia ekonomio de nia lando.

laborantoj de la observatorio faras reparon por preciza fotografa observado pri artefarita teratelito.




Diskuto pri suna fiziko



La Ziginŝan-a Observatorio







Observado pri aktivado de la suno per kromosfera teleskopo

Radoradiada teleskopo de la observatorio por esplori la fortecon de la radoradiado de la suno



Kolorriĉaj Popolaj Kantoj kaj Dancoj

— Pri Prezento de la Jugoslava Kanta kaj Danca Ensemblo en Ĉinio

EN aŭgusto de la kuranta jaro, la jugoslava Kanta kaj Danca Ensemblo “Ivo Lola Ribar” de Beogrado faris vizitan prezentadon al Ĉinio kaj alportis al ni ne nur kolorriĉajn kantojn kaj dancojn sed ankaŭ amikecon de la jugoslava popolo.

La Kanta kaj Danca Ensemblo “Ivo Lola Ribar” estas formita el junaj gerilanoj en 1944 dum la kontraŭfaŝisma milito. Tuj post sia fondiĝo, ĝi iris al la fronto por konsoli la batalantojn kaj vunditojn per prezentado kaj faris sian kontribuon per siaj batalaj kantoj kaj dancoj al la luktado

Ŝokaĉke-dancoj



kontraŭ agresado kaj defendo de la nacia sendependeco. Ivo Lola Ribar estas popola heroo, kiu glorie oferis sian vivon en la kontraŭfaŝisma milito. Post la milito, la ensemblo fariĝis popola ensemblo de kantoj kaj dancoj kaj estis oficiale nomita laŭ la nomo de la heroo. Ĝi estas unu el la jugoslavaj eminentaj ensembloj kun revolucia tradicio kaj altaj atingoj en arto. Inter la programeroj prezentitaj de ĝi troviĝis kantoj kaj dancoj pri la batalo de la jugoslava popolo por defendo de la nacia sendependeco kaj liberigo de la patrolando, kaj ankaŭ eminentaj kantoj, dancoj kaj muzikaĵoj el la diversnaciecaj popoloj de Jugoslavio. La entuziasmegaj melodioj, rapidaj kaj gajaj movoj kaj variaj formoj de la dancoj montris la apartajn artajn stilojn de la diversaj naciecoj de Jugoslavio.

La “Kanto de Gerilo ‘Kolo’ ” kantita de la ĥoro estas kantserio verkita de komponisto B. Iliĉ, kiu kolektis famajn gerilajn kantojn de ĉiuj respublikoj de Jugoslavio. Tiuj kantoj kuraĝigis gerilanojn kaj revoluciajn batalantojn en bataloj, karceroj kaj ekzekutejoj al ilia heroo luktado kontraŭ la malamikoj. La altaj ŝtalecaj tonoj kaj fortecaj taktoj montris la firman volon de la jugoslava popolo brave batali kontraŭ la malamikoj.

La arto de kuna kantado havas longan tradicion kaj vastan fundamenton en la popolamasoj de Jugoslavio. La komponistoj heredis la nacian tradicion de la kune kantataj kantoj de Jugoslavio kaj disvolvis la multajn esprimajn formojn de la arto de kuna kantado. La kuna kantado sen akompanado de muzikiloj sub direktado de Ivo Draĵiniĉ atingis relative altan nivelon en tekniko kiel precizeco de tonoj, unueco de tembro kaj harmonio de la voĉoj. La jugoslavaj geamikoj kantis ne nur kontraŭfaŝismajn batalajn kantojn, sed ankaŭ la ĉinan revolucion historian kanton “Larĝa Vojo” por esprimi la amikecon de la jugoslava popolo al la ĉina, kaj ili rikoltis varmajn aplaŭdojn de la ĉinaj spektatoroj.

La danco “Komita” prezentas la batalan vivon de la gerilanoj de Komita en la macedona mont-regiono je la komenco de la 20-a jarcento por liberigi la patrion el la manoj de la turkaj okupantoj: Grupo da gerilanoj sub la gvido de sia komandanto antaŭenpuŝiĝis skoltante kaj penetris en kazernon de la malamiko. La batalantoj jen rampas antaŭen, jen salte leviĝas kaj batalas kun malamikoj. Post kiam la komandanto vundiĝis, la batalantoj denove faris sturmon tute sentime. . . Kun movoj ĉerpitaj el batala vivo kaj paŝmanieroj

Albana danco de Jugoslavio





Prezento de macedonaj kantoj

el popolaj dancoj, la danco reliefe montras la sinoferemon de la jugoslava popolo, kiu ne volis submetiĝi al la regado de la agresantoj kaj heroe batalis por libero kaj sendependeco. “Vrlica ‘Kolo’ ” estas danco ankoraŭ pli antikva, kiu naskiĝis en la meza epoko, kiam turkaj invadantoj okupis tiun regionon. La malamiko malpermesis al la popolo kunveni kaj danci, tial popolanoj dancis sen akompano de muziko. Tiu danco estas transdonita de generacio al generacio ĝis nun. La dancantoj unuecigas la taktojn de siaj dancmovoj per la klakoj de la metalaj pecoj sur la vestoj de la virinoj kaj la paŝbruoj, anstataŭ per akompana muziko. Tiu danco montras la reflekseblecon de la jugoslava popolo antaŭ la agresantoj kaj apartan formon de arto. Ambaŭ “Gajaj Ŝopa-dancoj” kaj “Ŝokaĉke-dancoj” karakteriziĝas per ĝojeco, vigeleco kaj intensa vivspiro. Ĉar ambaŭ ili enhavas konkurson de dancado kaj atletiko, tial la paŝmaniero estas relative komplika kaj povas pli bone manifesti la fajnan kaj spertan dancarton de la geaktoroj, kaj krome ili ankaŭ manifestas la entuziasmecon kaj optimismon de la jugoslava popolo.

La popola orkestro el 13 membroj kun Milutin Popoviĉ kiel la estro sukcese ludis la “Kantojn de la Diversnaciecaj Popoloj de Jugoslavio” kaj aliajn relative malfacilajn popolajn ariojn kun diversaj stiloj, variaj melodioj kaj kadencoj. Kaj ili ludis ankaŭ la ĉinan arion “Marnavigo Dependas de Stiristo” kaj gajnis varman aplaŭdadon de la spektantoj.

En kantado de la virina solo “Dalmatiaj Kantoj” kaj la vira solo “Macedonaj Popolkantoj”, la geaktoroj atingis tre altan nivelon en voĉmuzika tekniko kaj esprimo de popolkanta stilo.

La diversaj nacioj de Jugoslavio havas tre riĉajn kulturon kaj arton kun antikva tradicio kaj malsamaj naciaj karakterizaĵoj. La programeroj prezentitaj de la Kanta kaj Danca Ensemblo “Ivo Lola Ribar” dum la vizitado al Ĉinio montris, ke ĝi faris diligentan laboron en kolektado, ordigado, heredado kaj disvolvado de la jugoslava nacia arto kaj rikoltis ĝojindajn fruktojn, kaj tio estas lerninda por la ĉinaj revoluciaj artaj laborantoj.

En la Neforgeseblaj Tagoj de Amikeco

KIEL membroj de la Ŝanhaja Danc-drama Trupo de Ĉinio, ni venis, trans maroj, al Japanio por fari amikecan vizitadon kaj prezentadon kaj trapasis tie 36 neforgeseblajn tagojn.

Vespere de la 10-a de julio, sur la Tokia Haneda Aerodromo, pli ol 2,000 amikoj de diversaj rondoj venis por bonvenigi nin spite de pluvo. Ili laŭte kriis sloganojn svingante flagojn. Multaj amikoj forte premis niajn manojn dirante: “Fine vi venis!” Ĝojaj kaj emociitaj, ni ne sciis kion diri kaj nur manpremis kun kaj salutis al ili. Tiam, la japanaj amikoj ekkantis la kanton *Blovas la Norda Vento* el la baledo *Blankhara Knabino*. La kortuŝa kanto nun kvazaŭ ankoraŭ sonas ĉe niaj oreloj.

En Japanio ni faris 19 prezentadojn, kiujn rigardis multaj amikoj de la japanaj politikaj, ekonomiaj kaj literaturaj kaj artaj rondoj kaj amasaj spekta-

toroj. Iu rigardanto diris, ke li ŝatas kaj komprenas tian baledon por la laborista kaj kamparana amasoj. Alia diris, ke antaŭe la baledoj estis sen akompanaj kantoj, nun nia baledo kun kantoj elkantis kion ilia koro sentis!

Dum la publika prezento en Osaka, kiam Hier suferis persekuton de la tirana bienulo, multaj amikoj ekploris, kaj kiam ili vidis ke Hier estis liberigita el suferoj kaj la ruĝa suno malrapide leviĝis, ili dronis en granda ĝojo. Ili diris: “Kiam ni vidis la leviĝon de la ruĝa suno, nia koro pleniĝas de ĝojo kiel la via. Kiam ni trovis ke komuniĝis sentimento de la rolantoj kaj rigardantoj, ni des pli bone sentis ke la ĉinaj kaj japanaj popolanoj havas komunajn volon kaj sentimenton por kreskigi amikecon.

Niaj vizitado kaj prezento trovis fortan subtenon ĉe la multaj amikecaj rondoj kaj amikoj

Ĉinaj aktoroj ludas la baledon “Ruĝa Virina Taĉmento” en Ajĉi-sporthalo, Nagoja.





Maŭ Hujfang kaj Ŝi Ĝongkin amike interparolas kun Moriŝita Joko.

de diversaj flankoj en Japanio. Multaj pene laboris por niaj vizitado kaj prezentado eĉ forgesante dormon kaj manĝon. Ĉiufoje kiam ni pensis pri tio, tre longe ni ne povis kvietigi la emociitan koron.

La ŝoforoj kaj gvidistoj kiuj ĉiutage vivis kun ni, zorgis pri ni kiel siaj parencoj dum veturado. La gvidistoj instruis nin kanti japanajn kantojn kaj konigis al ni la vidindaĵojn sur la vojo. Kaj ni prenis ilin kiel niajn intimulojn. Ni invitis ilin rigardi nian prezentadon, babilis kun ili, kaj per tio stariĝis inter ni profunda amikeco. Kiam ni adiaŭis ilin ĉe la Osaka Stacio post nia vizitado en la regiono de Kansaj, la ŝoforoj kaj gvidistoj de niaj aŭtobusoj donacis al ni ilustritajn poŝtkartojn kaj aliajn kiel memoraĵojn. Ili diris kun bedaŭro: “Pro la laboro, ni ne povas veturi al Tokio kune kun vi, tamen, nia koro ĉiam restos kune kun la via. Ni esperas ke vi revenos en la estonto!” Alia gvidisto emocie diris al ni kun larmoj: “Mi volas ĉiam resti via amiko!”

En someraj ferioj, multaj japanaj studentoj fervore helpis nin en laborado. Iuj mem iniciate ascendis la scenejon post rigardo de nia ludo por helpi nin malmunti la dekoracion. Vere neforgesebla estas tia amikeco.

En la hoteloj kie ni loĝis, la kuiristoj delikate faris ĉinajn manĝaĵojn kun variaj specoj por ke ni havu bonan apetiton. Ankoraŭ unu alia hotela servistino donis al ni profundan impreson. Ĉiutage ni intervidiĝis kun ŝi kaj interkoniĝis kun ŝi ĉiam pli bone. Iutempe kiam ni trovis ŝin tre okupata, ni mem iniciate helpis ŝin balai ĉambron. Je la adiaŭo, ni ĉiuj sentis koran bedaŭron, kaj ŝi demetis la oran ringon de sia fingro kaj diris kun larmoj: “Mi ja ŝatas homojn tiom viglajn, varmajn kaj modestajn kiaj vi estas. Mi esperas ke vi kunportos mian tre ŝatatan oran ringon al via lando, tio ja estas mia amo al vi...” Ni diris: “Ni akceptas vian amon kaj esperas ke vi tenu vian ŝatataĵon ĉe vi, kaj ni certe kunportos vian amon al la ĉina popolo!”

Krom prezentado, en Japanio ni faris ankaŭ vizitadon al fabrikoj kaj vilaĝoj, kaj pli ol 10 amuzajn aktivadojn kune kun japanaj laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj amikoj de la literaturaj kaj artaj rondoj. En tiuj aktivadoj ni sentis profundan amikecon inter la dulandaj popolanoj, kaj multaj kortuŝaj scenoj eĉ nun ankoraŭ aperas antaŭ niaj okuloj. Precipe neforgeseblaj estis la tagoj kiam ni vivis kune kun la malnovaj amikoj de la Macujama Baleda Trupo kaj Haguruma Teatra Trupo.

Antaŭ prezentado en Tokio, ni ne povis tuj trovi konvenan ekzercejon. Tion sciinte, amikoj de la Macujama Baleda Trupo tuj cedis al ni sian solan ekzercejon por nia uzo. Macujama Mikiko ankaŭ akompanis nin en ekzercado. Ŝi serioze observis ĉiun dancmovon. Post la komenco de nia publika prezentado, gvidate de la estro de la trupo Ŝimizu Masao, la aktoroj kaj reĝisoro ĉiutage aktivadis kune kun ni. Ili donis al ni multajn zorgojn en laboro kaj vivo. Kiam ni descendis la scenejon, iliaj ĉefaj aktorinoj tuj venis al ni por forviŝi nian ŝviton kaj porti trinkakvon al ni kiel niaj fratinoj. Precipe Moriŝita Joko, unu el la ĉefaj aktorinoj kiuj ludas la rolon de Hier kaj Blankhara Knabino, ĉiam varme donadis al ni viŝtukon kaj teon. Ni rimarkis ke ŝi iras malfacile, kaj poste ni informiĝis ke difektiĝis ŝia kalkana tendeno pro trolaciĝo, kaj pro tio ŝi jam ne faris prezenton dum pluraj monatoj. Tion trovinte nia kuracisto tuj donis al ŝi kuracadon. Je la

komenco, dum la interakta paŭzo, ŝi ĉiam petis haltigi la kuracadon kaj la kuracisto ne sciis la kialon. Poste li trovis la kaŭzon, ke ŝi volis porti teon al la ĉinaj aktoroj, kiuj finis sian ludon. Tio tre kortuŝis nin. Je nia foriro al aliaj lokoj por prezentado, la kuracisto postlasis al ŝi medikamenton kaj konigis al ŝi la metodon por ke ŝi daŭrigu la kuracadon. Kiam ni revenis al Tokio, nia kuracisto refoje demandis ŝin pri la malsano. Ŝia piedo jam ne plu ruĝe ŝvelis kaj la kalkana tendeno jam ne plu doloris. Ŝi ĝoje diris: "Post resaniĝo mi ne nur daŭre ludos la rolon de Hier kaj Blankhara Knabino, sed ankaŭ faros kontribuojn por kreskigi pliapaŝe la amikecon inter la japana kaj ĉina popoloj!" Ŝia spirito estas lerninda por ni.

En Osaka, ni ankaŭ okazigis amikecan amuzan kunvenon kune kun la japanaj aktoroj. Ĉiuj aktoroj de la Haguruma Teatra Trupo venis de

Japanaj amikoj de Jamanasi-gubernio donacas al aktoroj de la Ŝanhaja Danc-drama Trupo persikojn produktitajn de ili.





Aktoroj de la Ŝanhaja Dancdrama Trupo vizitas kamparaninojn de Jamanasi-gubernio.

la malproksima Jamaguĉi-gubernio. En la kunveno, ni kaj amikoj de la Macujama Baleda Trupo kaj la Haguruma Teatra Trupo kune prezentis kantojn kaj dancojn sur la scenejo. Solidareca atmosfero ĉiam regis la kunvenon. Post la kulisoj, aktoroj de Macujama varme helpis la ĉinajn ĝustigi la movon en la japana danco *Flora Ĉapeleto*, kaj la lastaj helpis ilin provludi la ĉinan popoldancon lernitan de ili en Ĉinio *Kanto pri Vestolavado*. La aktoroj de Haguruma laŭte kantis ĉinajn revolucionajn kantojn en la ĉina lingvo kaj prezentis programerojn spegulantajn la ĉinan socialisman konstruadon. Ni kune kantis kaj dancis sur la scenejo, amike interparoladis kaj ĉio ĉi tio restigis neforgeseblan impreson en ĉies koro.

En la 16-a de aŭgusto, ni finis la vizitadon kaj prezentadon en Japanio, kaj reveturis al la patrolando per du jetoj pasaĝeraj de la Japana Kompanio de Aerlinio kaj la Tutjapana Kompanio de Aervojo kun amikeco de la japana popolo al la ĉina. Tio estas la unua fojo post la milito ke la japanaj civilaj aviadiloj rekte flugis al Ĉinio, kio spegulis la pliapaŝan disvolviĝon de la amikeco inter la dulandaj popoloj. Nia reveno estis amikeca veturado,

kaj la tuta kajuto plenis de kantoj kaj ridoj. La aviadilaj stevardinoj intime parolis en la ĉina lingvo: “Bonvolu trinki teon!” kaj “Bonvole manĝu!” La japanaj amikinoj diris al ni, ke ili lernis ofte uzatajn frazojn de la ĉina lingvo antaŭ semajno por kreskigi la amikecon inter ambaŭ landoj. La aktorinoj de nia trupo tuj amikiĝis kun ili kaj interŝanĝis kun ili memoraĵojn por tiu ĉi amikeca veturado.

Post pli ol du horoj, la aviadiloj haltis sur la Ŝanhaja Hongkiaŭ-a Aerodromo. Laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj literaturaj kaj artaj laborantoj de Ŝanhajo bonvenigis nin kaj la kunveturantajn japanajn amikojn per tamtamoj kaj tamburoj. En tiu momento ni ne povis deteni nian emocion. Ni nepre klopodos pli energie en la venonteco por fari kontribuojn por pliapaŝe antaŭenpuŝi la kulturalan interŝanĝon kaj kreskigi la amikecon inter la ĉinaj kaj japanaj popoloj. Des pli bele floru la floroj de amikeco!

**Maŭ Hujfang* — rolanto de Hier

Ŝi Ĝongkin — rolanto de la Blankhara Knabino

Memorigaj Poŝtmarkoj

La 2-an de septembro, 1972, la Komunika Ministerio de nia lando emisiis serion da memorigaj poŝtmarkoj kun la titolo "La Unua Azia Tablotenisista Ĉampionado" okaze de UATĈ. Ĝi konsistas el kvar pecoj. La unua poŝtmarko portas desegnon de la inŝigno de UATĈ sur la fono de verda montaro kaj pinoj, kiuj simbolas solidarecon kaj amikecon de la aziaj popoloj. Sur la dua estas

geknaboj kun florbukedoj kaj frapiloj en la manoj, kiuj varme bonvenigas diverslandajn geamikojn de Azio. Sur la tria estas gesportistoj en streĉa maĉo antaŭ la fono de florbukedoj, kiuj simbolas prosperecon kaj disvolviĝon de tablotenisista sporto en Azio. Sur la kvara estas tri tablotenisistinoj de malsamaj regionoj en intima interparolado. La unuaj tri valoras po 8 cendoj kaj la kvara 22.





Profunda Frateco

apud Tengtiaŭ-rivero

ĈINIO kaj Vjetnamio estas najbaraj landoj interligitaj per samaj montoj kaj riveroj, kaj tamen pli grave estas, ke la popoloj de la du landoj interligiĝas koron kun koro.

Ĉe Ajlaŭ-monto kaj apud Tengtiaŭ-rivero inter nia Junnan-provinco kaj la Vjetnama Demokratia Respubliko, cirkulas rakontoj pri reciproka helpo, unuiĝo kaj amikeco inter la du popolanoj.

RECIPROKA ZORGO

Iun vesperon, He Ermej, komunumanino de Ĵeŝujtang-produktgrupo de Ŝilicun-brigado, Ĝinping-gubernio, Junnan, subite grave malsaniĝis kaj svenis. Ĉar la brigada kuracejo troviĝas fore je 20 km., komunumanoj volis sendi ŝin tien per bran-kardo, sed timis, ke tio prokrastos la kuracon.

La informo flugis trans Tengtiaŭ-rivero al la heroa vjetnama tero. Vjetnamaj fratoj de la vilaĝo Sa Ha maltrankviliĝis same kiel la ĉinaj amasoj de Ĵeŝujtang. Iu juna kuracisto de la vjetnama hospitalo Mong So, kiu venis al Sa Ha por fari rondiran kuracon, tuj kuris al Ĵeŝujtang kunportante sian medikamentan keston.

Sur Tengtiaŭ-rivero furioziĝis vento kaj pluvo, kaj ondegis la akvo. La vjetnama kuracisto, spite de sia vivdanĝero, transnaĝis al la norda bordo por savi la ĉinan fratino.

Kiam ŝi tramalsekigita de kotakvo atingis Ĵeŝujtang, estis jam profunda nokto. La vilaĝanoj bruligis lignaĵon kaj gastame regalis la vjetnaman kunbatalantino per varma teo. Eĉ ne konsuminte tempon por trinki, ŝi tuj faris al He Ermej diagnozon, injektadon kaj helpis ŝin preni medikamenton.

Post duona horo, He Ermej vekigis el sveno kaj ŝia vivo estis savita.

Matene de la sekvanta tago, antaŭ sia foriro la vjetnama kuracisto lasis injektaĵojn kaj foje-refoje diris ke oni faru injektadon al la malsanulino kaj nepre informu ŝin pri la malsanulina stato. Vilaĝanoj de Ĵeŝujtang adiaŭis la kuracistinon akompanante ŝin ĝis malproksimo. Je la disiĝo, ili forte premis ŝian manon kaj esprimis, ke ili nepre subtenos la vjetnamajn kunbatalantojn en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso per konkretaj agoj.

Same kiel la vjetnamaj popolanoj ame zorgas la ĉinajn, ankaŭ la ĉinaj popolanoj ĉe la landlimo de Junnan rigardas la sekurecon de la vjetnamaj popolanoj kiel la sian. Iun tagon, kiam mjaŭ-nacia 56-jara onklino Ly A To de la vjetnama vilaĝo Nam Vi transveturis Tengtiaŭ-riveron, ŝia ŝipo subite renversiĝis pro ondegoj. La onklino estis forportita de la torento. Vidinte tion ĉina ŝipisto Daŭ Guangming en la posta ŝipo tuj saltis en la torenton por savi la droninton spite de la furiozaj ondegoj. Englutinte buŝojn da akvo en la torento, li fine elsavis la onklinon. Tamen la onklino jam svenis, ŝiaj pupiloj dilatiĝis, la korbato malfortiĝis, kaj ŝi falis en danĝeron de morto.

Informiĝinte pri tio, ĉinaj kuracistoj Vang Hin kaj Daj Tianzaj de Ĝinŝujhe-kuracejo tuj rapidis al la pramejo. Vicestro de la revolucia komitato de Ĝinping-gubernio persone sendis kuracistojn por la urĝa savo. Vilaĝanoj alvenis al la pramejo kaj kolektiĝis ĉirkaŭ la onklino, ili ĉiuj volis ion fari por ŝi.

La kuracistoj eligis akvon el ŝia ventro, faris al ŝi artan spiron kaj injektis korfortigan medikamenton. Onklino Ly fine rekonsciiĝis.

Por eldanĝerigi ŝin pli rapide, oni sendis ŝin al la gubernia hospitalo. Post kvin-taga kuracado Ly A To elhospitaliĝis. Je la tago por sia reveno al la patrolando, ŝi diris al la ĉinaj kamaradoj: "Post reveno, mi nepre diligente laboros kaj subtenos al la fronto por forte bati la usonan imperiismon."

AMIKECO PRI PRAMO

Iun serenan tagon, la kadroj kaj amasoj de Ginŝujhe-produktgrupo de Mengla-komunumo, Ginpings-gubernio venis, kun bedaŭro, al pramejo por adiaŭi La A Dong kaj aliajn tri vjetnamajn kamaradojn de la vilaĝo Ba Dang. Prenante la manojn de la lastaj, la ĉinaj kamaradoj foje kaj refoje petis, ke ili transdonu ilian koran dankon al la amasoj de Ba Dang.

Oni devas rakonti la aferon dekomence:

Iun nokton, ventego kaj pluvego furiozis senĉese, la akvo de Tengtiaŭ-rivero kaj Ginŝujhe-rivero ŝvelis rapide. Granda ligna boato ĉe la pramejo en la kunfluejo de ambaŭ riveroj estis forportita de la akvego pro rompiĝo de ĉeno.

Tiu boato estas pramo de Ginŝujhe-produktgrupo. La grupestro Vej Ĵongbaŭ tuj sendis milicianojn al la malsupra parto de la rivero por serĉado, sed la boato ne estis trovita.

Kiam la pramo estis portita de la fluo al la vilaĝo Ba Dang en la malsupra parto, la tieaj amasoj trovis ĝin senhoma kun peco da fera ĉeno en akvo, kaj ili tuj komprenis, ke ĝi estas ĉina pramo alportita de la akvego. Kelkaj vjetnamaj junuloj tuj saltis en la riveron kaj albordigis ĝin post pena remado. Tamen ĝi difektiĝis en hulpeco pro kolizio. Ili do ĝin riparigis kaj samtempe informis tion al la ĉinaj kamaradoj.

La informo tre ĝojigis la amasojn de Ginŝujhe. Ili tuj sendis Tong Juhian kaj aliajn dek komunumanojn al la vilaĝo por danki la vjetnamajn kamaradojn. La amasoj de Ba Dang akceptis ilin kiel parencojn, entuziasme regalis ilin per rizvino, kokaĵo kaj anseraĵo.

Konsiderante, ke sur la akva vojo de Ba Dang ĝis Ginŝujhe multiĝas kirloj kaj mallarĝas la riverlito, kaj ke la ĉinaj kamaradoj eble trafos survoje danĝeron pro nekono de tiu riverparto, la vjetnamaj kamaradoj sendis La A Dong kaj aliajn tri kamaradojn gvidi ilin per kanoto, por ke la ĉinaj fratoj sekure veturigu sian pramon al la pramejo de Ginŝujhe.

Matene de la sekvanta tago, la suno brilis. Sur Ginŝujhe-rivero la kanoto antaŭiris, kaj la granda boato ĝin postsekvis. La du boatoj venis al la pramejo de Ginŝujhe kun profunda amikeco de la heroa vjetnama popolo al la ĉina.

FAJRO PRUVIS AMIKECON

Ambaŭflanke de iu valo, tra kiu fluas Tengtiaŭ-rivero, sin trovas du vilaĝoj, ili estas ĉina Tajjang-vilaĝo kaj vjetnama vilaĝo Ma Lat Pha. La loĝantoj de ambaŭ vilaĝoj vidas kaj aŭdas ĉiutage unuj la aliajn.

Dum la streĉa printempa plugado, Deng Damej kaj aliaj 6 virinoj de Tajjang-produktgrupo semis maizon en kampo proksima de la vilaĝo. Tagmeze, kiam ili streĉe laboras surkampe sub brula suno, ili subite vidis, ke ekbrulas la vilaĝo de la vjetnamaj fratoj sur la kontraŭa monto. "Tuj ilin helpu!" Deng Damej kriis kaj la unua kuris malsupren al la kontraŭa monto.

En tiu ĉi regiono la montoj estas altaj kaj la valoj profundaj. Sur ambaŭ flankoj de la montoj oni povas interparoli, sed por atingi la alian monton oni devas iri pli ol unu horon. Pensante, ke la vjetnamaj gefratoj de Ma Lat Pha ĉiutage iras al kapolaboro en frua mateno kaj revenas malfrue por akiri riĉan rikolton de greno por subteni la fronton, kaj nun en la vilaĝo certe ne estas homoj, la sep ĉinaj virinoj plirapidigis siajn paŝojn. Ili kuris sur kruta montvojo, rapide atingis la vilaĝon kaj tuj sin ĵetis en la brulantajn domojn por elpreni grenon kaj posedaĵon de la vjetnamaj gefratoj. Tiam iu kriis: "Ascendu la tegmenton, baru la flamon!" Kun la krio, ili ĉiuj ascendis la tegmenton. Deng Damej subite aŭdis akran voĉon por peti helpon el proksima domo. Ŝi tuj malsupren saltis kaj kuris en la domon, poste ŝi elportis surdorse el ĝi maljunulinon, kiu malsaniĝas sur lito.

En tiu tempo ankaŭ la vjetnamaj gefratoj rapide revenis informiĝinte pri la bruliĝo. Post streĉa kuna klopodo, la incendio estis estingita kaj pli ol 90 procentoj de la domoj estis savitaj. Kvankam hararo kaj brovoj de la ĉinaj kamaradinoj estis bruldifektitaj, tamen ili tre ĝojis, ke la vilaĝo de la vjetnamaj gefratoj estis savita. Kiam la amasoj de Ma Lat Pha esprimis sian dankon al ili, tiuj lastaj respondis: "Ĝuste vi la heroa vjetnama popolo estas por ni lerninda ekzemplo!"

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £ 0.50 Can.\$ 2.00
2 jaroj £ 0.75 Can.\$ 3.00
3 jaroj £ 1.00 Can.\$ 4.00

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu faros
abonon antaŭ la 31-a de la venonta januaro,
ricevos belan esperantan bild-kalendaron.





NOVAJ PROGRAMEROJ DE LA PEKINA PUPOTEATRA TRUPO

En la lasta tempo, la Pekina Pupoteatra Trupo prezentis teatraĵon *Kokeriko en Nokto* kaj aliajn novajn programerojn,



Artistoj de la Pekina Pupa Teatro faras ekzercon.

Tibeta danco



kiaj kantodancoj kaj ludo de muzikaĵoj. Ili ĉiuj estas varme akceptitaj de infanoj.

La laborantoj de tiu trupo klopodas por krei heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj figurojn de infanoj de la nova Ĉinio. Ili kritike heredas kaj disvolvas la tradician teknikon pupoteatran por servigi ĝin al novaj enhavoĵoj. En la tibeta kantodanco *Brilas la Ora Suno de Pekino* prezentanta la amon de infanoj al Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, ili aplikis kaj disvolvis la tradician arton de svingo de maniko. En la tradiciaj pupoteatraĵoj la plejparto de la pupoj portis sur si longan robon kun vastaj manikoj kaj malofte prezentis movojn de la manoj. Tamen en *Ludo de Muzikiloj* per movoj de fingroj kaj manartiko de la pupoj oni faris ilin pli similaj al vivaj homoj. En tiu programero la 12 pupoj rolantaj ruĝajn geĝardianojn povas lerte ludi violonon, klarneton, fluton kaj aliajn muzikilojn, kaj iuj el ili eĉ povas movi siajn dek fingrojn. Ili kune ludas revoluciajn melodiojn, kia *Certe Venkos la Monda Popolo* kaj ricevis varman aplaŭdadon de la spektantoj.

DISVOLVIĜO DE MALGRANDAJ HIDROELEKTREJOJ DE GANSU

Gansu-provinco aktive konstruas malgrandajn hidroelektrejojn en kamparo. La provinco jam konstruis 416 malgrandajn hidroelektrejojn, kies elektra kapacito atingis pli ol 20,000 kilovatojn t.e. 4-oblo de tiu antaŭ la kultura revolucio.

La disvolviĝo de malgrandaj hidroelektrejoj akcelis la disvolviĝon de agrikulturo kaj lokaj malgrandaj industrioj. Dank' al konstruado de tiuj hidroelektrejoj, la drenado kaj irigacio per elektro en kampoj akiris disvolviĝon kaj tiel altigis la kapablon de agrikulturo kontraŭ sekegeco kaj inundeco. En multaj malgrandaj hidroelektrejoj instaligis maŝinoj por degraj-nigo, dispecigo, farunigo, senŝeligo, kotonsemigo, olepremado kaj aliaj.

Elimino de Veneno al Nengiang-rivero


LA nova industria urbo Cicihar situas ĉe la malsupra parto de Nengiang-rivero. Ĝi estas la dua granda urbo de Hejlonggiang-provinco. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la industrio, agrokulturo, brutobredado kaj fiŝkaptado laŭlonge de la rivero ricevis impetan disvolviĝon. Vastaj virgaj terpecoj estis kulturebligataj kaj la produkto-kvanto de greno kreskis cent-pocente. En la konsuma urbo Cicihar aperis fabrikoj de afinacio, maŝinfarado, kemiaĵoj, sukero, papero, ledo, medikamentoj, manĝaĵoj ktp. La totala produktovaloro de ĝi kreskis je pli-ol-40-oblo ol tiu en 1949.

Sed kun la disvolviĝo de industrio kaj kresko de la loĝantaro, ankaŭ la malpura akvo de Cicihar multiĝas kun ĉiu tago. Se oni lasus ĝin fluadi en Nengiang-riveron, ĝi malpurigus ĝian akvon kaj malutilus al la sano de la popolo. Tio vekis atenton de la Partio kaj registaro, kaj ili tuj sendis sciencajn

laborantojn por esplorado kaj asignis monon kaj necesajn ekipaĵojn kaj materialojn por preventi kaj elimini malpurigon de la rivero. La urba registaro de Cicihar starigis specialan fakon por zorgi pri tiu laboro. Unuflanke ĝi mobilizis la industriajn entreprenojn ekstrakti kromon, alkalon, pulpon, arĝenton kaj aliajn utilajn materialojn el la uzita malpura akvo; aliflanke ĝi mobilizis la popolojn por konstrui akvorezervejon kun kapacito de dudek milionoj da kubmetroj kaj kanalon kun longeco de 6 kilometroj por konduki la malpuran akvon de la urbo en la akvujegon, kies akvon oni povas utiligi post traktado por irigacii kampojn en la ĉirkaŭaĵo.

Mi pririgardis la Ŝtalan Fabrikon de Cicihar. Mi vidis en ĝi, ke malpura akvo kun relative forte venena fenolo fluas tra tuboj en hermetike fermitan basenon por traktado. Ellasinte peĉosimilan sedimenton kaj malvarmigite ĝi refluas en tubojn por denova uzado.

La Sukera Fabriko de Cicihar fabrikas cementon el sedimento.



En alia laborejo, granda kvanto da uzita akvo estas traktata por ekstrakti el ĝi ferozan sulfaton. En la lastaj jaroj, la ŝtala fabriko ekstraktis multajn utilajn materialojn el uzitaj likvo kaj akvo. En la sola jaro 1971 ĝi reprenis 1,800 tunojn da feroza sulfato kaj 60 tunojn da alkalo.

Ankaŭ la Sukera Fabriko de Cicihar energie klopodas por multflanka utiligo de uzitaj akvo, likvo kaj skorio. Ĝi produktis grandan kvanton da cemento, alkoholo, brando ktp. el la forjetaĵoj, kio malebligis al ili malpurigon de Nengiang-rivero.


Laboristoj de la Cicihar-a Fabriko de Galvanizado kaj Ŝpruclakado renovigis la zinkumadan teknologion senvenenigante la procedon, tiel ke la uzita likvo ne plu entenas venenaĵon kaj povas esti uzata por irigacii kampojn.

Veninte en la paperan fabrikon de Cicihar, mi vidis ke laktokolora likvo brue fluas al turo, per kiu oni reprenas pulpon post precipitado. En la pasinteco, la akvo entenanta pulpon uzita en farado de papero enfluis en Nengiang-riveron kaj ĝin malpurigis. En lastaj jaroj, la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj konstruis turon sin apogante sur la propraj fortoj por repreni pulpon. En 1971, ili ricevis pli ol 1,000 tunojn da pulpo, el kio oni faris pli ol 360 tunojn da diversaj paperoj kaj ankaŭ ĉesigis la malpurigon al la rivero.

Post pririgardo de kelkaj fabrikoj, mi intervjuis Vang Zenghiang de la revolucia komitato de Cicihar, kiu respondecas pri tiu laboro. Li diris al mi, ke Nengiang-rivero, kiu longas je pli ol 1,300 kilometroj, riĉe produktas pli ol 30 specojn da fiŝoj. Dank'

al apliko de la supre menciitaj aranĝoj, la malpurigo al ĝi estas jam fundamente eliminata. Analizado de riverakvo, prenita el tri partoj kun longeco de 450 kilometroj de la malsupra parto de Nengiang-rivero, montris, ke ĉiu litro da riverakvo entenas 8 ĝis 9 miligramojn da oksigeno — la kvalito de la akvo iom pli altiĝis ol antaŭ la apliko de la aranĝoj. Tia akvo taŭgas por vivado de fiŝoj kaj la produktokvanto de fiŝoj pli kaj pli kreskas.

Por sciiĝi kiel oni uzas malpuran akvon post traktado en irigaciado de kampoj en antaŭurbo de Cicihar, mi vizitis la rezervejon de malpura akvo en kiu malpura akvo estas tenata kaj traktata. Administranto diris al mi, ke ĉiu litro da traktita akvo entenas 27 miligramojn da nitrogeno, 5,6 miligramojn da fosforo kaj 1 miligramon da kalio, kiuj utilas al kreskado de agrikulturaj plantoj. Kaj krome, en tiu akvo sin trovas granda kvanto da organikaj utilaj al plibonigo de grundo. Cetere, la temperaturo de tiu akvo estas pli alta ol tiu de rivera kaj subtera akvo. Se oni irigacias kampojn per ĝi en la tempo de printempa semado, oni povas semi rizon pli frue en tiu malvarma regiono. Ekzemple, dank' al irigacio per malpura akvo post traktado, Kiangin-brigado de Longŝa-komunumo de Cicihar ricevis rimarkindan pliprodukton de rizo. Antaŭe la Tria Produktgrupo de Ajguo-brigado de tiu komunumo ne povis kulturi printempajn legomojn pro tio, ke la grundo de ĝiaj kampoj estas malbona, sed dank' al irigaciado per la akvo, la organikaj en la grundo estas multigitaj kaj ĝi ne nur povas kulturi printempajn legomojn sed ankaŭ altiĝis la produktokvanton de someraj legomoj.



Fiŝoj generataj en Nengiang-rivero

Bona Laborstilo de Komercaj Laborantoj

ĜANGNIAN estas urbeto de Ginŝan-gubernio en antaŭurbo de Ŝanhajo. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĉie en ĝi regas vicleco kaj prospero. Ĝiaj riparitaj stratoj estas pli ebenaj kaj puraj. Ĝiaj vendejoj abundas je diversspecaj varoj kaj estas amase vizitataj de klientoj. La tutkora servo de komercaj laborantoj de la urbeto al la popolo estas forte kortuŝa al kaj varme laŭdata de la amasoj.

HEJMO POR LA GASTOJ

Estis profunda nokto en aprilo de la kuranta jaro. Blovis ventego, furiozis pluvo kaj estis froste malvarme. Kiam servistoj de Ĝangnian-hotelo aranĝis la lastan gaston kaj estis forironta por ripozo post sia deĵoro, subite venis naŭ gastoj tramalsekigitaj. Ili estis komunumanoj trapasantaj Ĝangnian por aĉeti porkidojn en aliaj lokoj. Sciinte tion, la servistoj tuj portis al ili varman akvon por lavado kaj varman teon. Sed la komunumanoj tute ne zorgis pri si mem, sed timis, ke la pli ol 60 porkidoj tramalsekigitaj mortos de frosto. Por solvi la problemon, la servistoj interkonsiliĝis kaj tuj decidis ke unu el ili transportu la porkidojn al iu bredejo. Kaj tiu kamarado revenis nur post kiam li manĝigis kaj kovris porkidojn per pajloj.

Post kiam ĉio estis bone aranĝita, la komunumanoj ĝoje enlitiĝis. Sed kiel la servistoj povas iri por dormi, rigardante la amason da malsekaj vestoj de la komunumanoj? Ili pensis en si, ke ili nepre ne lasos la komunumanojn foriri en la malsekaj vestoj. Tial ili rehejtis la fornon kaj komencis sekigi la malsekajn vestojn, ŝuojn kaj ŝtrumpojn. En la sekvanta mateno, kiam la komunumanoj surmetis la sekigitajn vestojn kaj ekiris de la hotelo kun la porkidoj portataj per traktoro, ili emocie diris al la servistoj: “Ni nepre lernos de vi la spiriton de tutkora servo al la popolo kaj faros novan kontribuon en la agrikultura fronto!”

La hotelo havas nur kelkajn laborantojn. Ĉiutage, ili estas tre okupataj per registrado de gastoj, preparo de teo, ordigo de litaĵoj kaj purigo de ĉambroj. Sed krom tio, ili ankaŭ preparas varman akvon por gastoj, lavas pli ol 250 litkovrilojn, ordigas kaj purigas la meblojn. De multaj jaroj la hotelo estas elektita kiel avangarda unuo de higieno en la urbeto. Trovinte ke iuj gastoj estas okupataj, ili meminciate lavis kaj flikis vestojn por ili. Kiam ili rimarkis, ke butono de iu gasto estas perdita, aŭ la vesto de iu gasto estas iom ŝirita, ili tuj helpis lin per kudrado. Ili ofte iris al la fervoja stacio por preni pakajojn por gastoj aŭ por alporti malsanulojn per apogseĝo. Ili varme akceptis ĉiun gaston kiel sian parencon. Kiam gastoj esprimis dankon al ili, ili ĉiam modeste diris: “Tio estas nia devo.”

KLOPODI ĈIAMANIERE POR LA KLIENTOJ

En la urbeto Ĝangnian troviĝas magazeno nomata “Bajhua”. Ĝi ne estas granda, sed en ĝi vendiĝas pli ol 800 specoj da varoj por ĉiutaga bezono. Antaŭe la varspecoj de la magazeno ne estis tiel multaj kiel nun. Foje iu maljuna onklino speciale venis de sia hejmo 5-6 kilometrojn fora al la magazeno por aĉeti harreton, sed ŝi devis foriri malgaje, ĉar tio mankis al la vendejo. Tio vekis atenton ĉe la vendistoj. Ili pensis, ke estas erare ke ili ne volas vendi bagatelajn komercaĵojn, kiujn la amasoj bezonas. De tiam, ili energie multigis la specojn de bagatelaj komercaĵoj. Por kontentigi diversajn bezonojn de laboristoj kaj kamparanoj, ili atente observas la ŝatojn kaj petas opiniojn de klientoj de malsamaj seksoj kaj aĝoj en malsamaj sezonoj kaj ĉiamaniere klopodas por trovi varfontojn. Kvankam multaj malfaciloj aldoniĝis en konservado, montrado, kalkulado kaj librotenado de varoj, tamen ili sentas ĝojon, vidante la kontentan vizaĝon de klientoj kiuj sukcesis havigi al si ŝatatajn varojn.

La servistoj de Heping-restoracio en la urbeto klopodas por plibonigi sian servon. Ili plimultigis la nombron de la specoj de manĝaĵoj de pli ol 60 ĝis pli ol 100. La prezo de manĝaĵoj estas malalta kaj ilia gusto bona. Por kontentigi la bezonon de klientoj ilia servo daŭras ĉiutage ĝis la 22-a horo. En ĝi estas vendataj ankaŭ cigaredoj, alumetoj, sapoj kaj poŝtmarkoj. Ili ankaŭ donas informojn pri la vetero kaj horaro de aŭtobusoj kaj plenumas telefonan servon por amasoj. Ĉio ĉi tio estas bonvena al la amasoj.

OPORTUNON AL LA AMASOJ

La komercaj laborantoj de la urbeto Ĝangnian ne nur varme servas al la amasoj en vendejoj, sed ankaŭ ofte iras al fabrikoj kaj kamparo por provizi amasojn per varoj. En ĉiu vintro, komunumoj ĉirkaŭ la urbeto entreprenas akvoutiligan konstruadon, ili do fondis provizostacion sur la konstruejoj. Por pli bone kontentigi bezonojn de la kons-

truantoj, ili ankoraŭ kolportas varojn ĉirkaŭirante. La konstruantoj diris ke ili estas "bonaj provizistoj de la konstruejo". En la okupoplenaj sezonoj de ĉiu jaro, ili sendas varojn rekte al la hejmoj de komunumanoj.

Vendistoj de la apoteko de la urbeto ofte iras al proksimaj brigadoj por helpi komunumanojn koni, kulturi kaj kolekti drogherbojn kaj starigi lokajn apotekojn. Ili estas multe bonvenigataj de amasoj. Kaj vendistoj de metalaĵoj kaj elektraĵoj instrumentoj de la urbeto konstante venas al kamparo por peti opiniojn de komunumanoj. Ili aktive plivastigis la servan kampon kaj plimultigis la nombron de la vendataj varspecoj de pli ol 1,600 ĝis pli ol 2,500. Ili ankoraŭ meminciate helpas komunumanojn ripari agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn. En 1971, ili riparis pli ol 1,100 agrikulturajn maŝinojn kaj instrumentojn kaj ĝustatempe subtenis agrikulturajn produkton. Tial ili akiris varman laŭdon de la amasoj.

Vizito al Teo-komunumo

AN HONG

LUN tagon de frua somero, ni vizitis la te-produktejon Ŝuĉa-komunumon de Ŝuĉeng-gubernio, Anhuj-provinco. Ĝi situas ĉe la orienta piedo de Dabie-montaro kaj estas fame konata pro abunda produkto de "Orkideo-teo de Okcidenta Anhuj". Tiu teo estas speco de verda teo kaj havas apartan aromon de orkidea floro.

En la damninda malnova socio, la tiea loĝantaro vivis en mizerego sub kruelaj subpremado kaj ekspluatado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Kamarado Ŝi Fajin, la vicsekretario de la partia komitato de la komunumo, kiu akompanis nin dum la vizitado, estis jardungito en la malnova socio. Li malkaŝis al ni krimregon faritan de la japana imperiismo antaŭ 34 jaroj. En junio de 1938, pro la pasiva rezistado de la kuomintanga reakciularo, japanaj rabistoj senbride profundigis laŭ la Hefej-Anking-a Ŝoseo kaj faris mortigon kaj prirabon al loĝantoj kaj bruligon de iliaj domoj. En Ŝuĉa sola pli ol 1,000 ĉambroj jam estis bruli-

gitaj kaj pli ol 200 senkulpaj homoj, inkluzive de gejunuloj, maljunuloj kaj infanoj, estis mortigitaj.


En la jaro 1949, la Ŝuĉa-a popolo estis liberigita. Respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ, ili sin ekorganizis por rekonstrui siajn teĝardenojn. Precipe, la 16-an de septembro, 1958, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone inspektis Ŝuĉa-komunumon kaj montris direkton al la tiea popolo en disvolvo de tea produktado per sia instrukcio "starigu pli multajn teĝardenojn sur montdeklivoj". La Ŝuĉa-komunumanoj kun heroa spirito tuj ekagis laŭ la instrukcio. La areo de teĝardenoj de 1971 plimultiĝis ĝis 260 hektaroj, t.e. je ĉ. 2-oblo kompare kun tiu de 1949 antaŭ la Liberiĝo; la jara produktokvanto de seka teo atingis 260,000 kilogramojn, t. e. 3-oblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. La printempa teo produktita en la unua trimestro de la kuranta jaro estis 2-oblo de la totala produktokvanto de 1949 kaj kreis sian rekordon en la historio. Dume, ankaŭ greno akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj.

La pomua produktokvanto de greno en la pasinta jaro estis 480 kg. kaj la totala produktokvanto superis 2-oblon de tiu de 1949. Tiu loko ricevis riĉajn rikoltojn kaj de teo kaj de greno.

Akompanate de kamarado Ŝi Fajin, ni ascendis Kinggang-monton kaj ĉirkaŭrigardis malproksimen: teĝardenoj kuŝas unu apud alia sur ĝiaj deklivoj, tearboj kreskas en linioj kaj kanto de knabinoj teplukan-taj ŝvebas en la valo. Ili kantis:

*Starante sur la mont' rigardas
ni Pekinon.
Ni plukas tefoliojn por revolucio.
La teon al amikoj en- kaj ekster-
lande
liveros ni kun kor' de solidar-
konscio.*

K-do Ŝi ĝoje diris al ni, ke en la movado "Lerni de Daĝaj", Ŝuĉa-komunumanoj faris montohakadon, konstruis baraĵojn kaj plenigis kavojn, kaj tiamaniere kreis 140 hektarojn da novaj teĝardenoj kaj reformis pli ol 120 hektarojn da malnovaj teĝardenoj per branĉtranĉado, transplantado, elimino de tearbomankejoj kaj rekulturebligo. Nun ĉiuj virgaj montdeklivoj jam fariĝis ŝtupaj kulturejoj de tearbetoj. Kaj ni rigardis malsupren: rizkampoj estas kruciĝantaj, la serpentanta Kingŝuj-rivero fluas orienten tra la tuta komunumo, akvedukto 500 metrojn longa sin levas super la rivero, alttensiaj elektrofadenoj etendiĝas malproksimen, aŭtoj kuras tien kaj reen sur ŝoseoj, traktoroj laboras sur kampoj. Montrante al ni Kingŝuj-riveron per la fingro maljuna Ŝi diris, ke la rivero fluas tra 10 brigadoj kun pli ol 200 hektaroj da agro kaj ofte suferigis pli ol 100 vilaĝojn per inundo. Ekde la jaro 1970, ili organizis pli ol 7,000 homojn por konstrui baraĵojn kun totala longeco de 11 kilometroj kaj plenumis la taskon en du vintroj, tiel ke finiĝis la katastrofo. En la pasintaj pli ol dek jaroj ili konstruis 55 mezgrandajn kaj malgrandajn akvomezervujojn, 12 irigaciajn kanalojn kun totala longeco de 60 kilometroj kaj aliajn akvoutiligajn konstruaĵojn, movinte pli ol 2,000,000 kubmetrojn da tero kaj



Nova teĝardeno

ŝtonoj. Dank' al tio la produktokvanto de teo kaj greno kreskas jaron post jaro.


Poste, ni malsupreniris al tefarejo de la komunumo. Iu maljuna laboristo diris al ni, ke en la pasinteco oni pretigis teon tute per manoj en malfacilaj kondiĉoj, dum hodiaŭ efektiviĝis mekanikigo. Montrante al ni maŝinojn li diris: "La plejparto de tiuj maŝinoj estas projektita, farita, reformita aŭ kopie fabrikita de ni laboristoj mem." Maljuna Ŝi diris, ke kun la disvastiĝo de kulturata areo kaj altiĝo de produktokvanto de teo kaj greno, aperas manko de laborfortoj por teplukado kaj sekigo de 1,000,000 kg. da tefolioj kaj grensemado, kio certe influos disvolviĝon de la produkto, se oni ne solvos la kontraŭdiron. Tial, sin apogante sur la propraj fortoj ili starigis unun post alia traktorstacion kaj pli ol 30 fabrikojn, por tefarado, maŝin-

riparado, grenprilaborado, oleelpremado kaj aliaj, kaj posedas pli ol 200 diversajn maŝinojn inkluzive de ŝargaŭtoj, traktoroj, tepretigaj maŝinoj, dizeloj, elektraj motoroj, pumpiloj k. a. Dank' al uzado de maŝinoj, la kvar tefarejoj funkciigataj de la komunumo kaj ĝiaj brigadoj kaj produktaj grupoj povas pretigi ĉiutage pli ol 5,000 kilogramojn da seka teo dum la streĉe rikoltaj monatoj kaj ŝpari dekojn da miloj da labortagoj ĉiujare, kio multe akcelis la disvolviĝon de produkto de teo kaj greno.

Post la tagmanĝo, ni vizitis la produktan grupon Ĉonglaŭ. En sia hejmo la grupestro Vej Liangbing regalis nin per ĵus infuzita orkideo-teo kun verda koloro kaj intensa aromo. Ĝi vere meritas sian faman nomon. Dum babilado, la grupestro diris al ni, ke tie ĉi loĝas pli ol 40 familioj, el kiuj la plejparto estas alfuĝintoj post bruligo de siaj domoj

fare de japanaj diabloj dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Post la Liberiĝo, ili fariĝis mastroj de la ŝtato kaj novigis la fizionomion de sia malriĉa vilaĝo. Ilia vivo ĉiam pli boniĝas.

Adiaŭinte la grupestron, ni renkontis sur pado aron da viglaj kaj amindaj gelernantoj. Tial nia parolo transiris al la problemo pri la kulturaj kaj edukaj aferoj de Ŝuĉa-komunumo. Subtenate de la ŝtato, la komunumo, laŭ sia propra bezono, starigis por la geknaboj 1 mezan kaj pli ol 100 elementajn lernejojn kaj krome ankaŭ 1 teoteknikan lernejon kaj 2 hospitalojn. La koopera kuraca sistemo estas ĝeneraligita, tiel ke ŝanĝiĝis la stato de manko de kuracistoj kaj medikamentoj en la montregiono. Nuntempe, la tieaj loĝantoj povas rigardi filmon kaj ĉiu familio povas aŭdi radiodisaŭdigon. Hodiaŭ la montvilaĝo tute noviĝis.



Elektra pumpstacio konstruita de Ŝuĉa-brigado per siaj propraj fortoj

Disigitaj Parencoj de Du Familioj Estis Retrovitaj

LUTAGE, la policejo de Gongtan-vilaĝo en Joŭjang-gubernio, Siĉuan-provinco, ricevis leteron de la partia komitato de iu fabriko de la urbo Gujjang de Gujĝoŭ-provinco por peti serĉadon de Han Feng, fratino de laboristo Han Gjunmin de la fabriko. En la koverto estis kunmetita letero de Han Gjunmin, en kiu li skribis: Li naskiĝis en Fuling-gubernio de Siĉuan-provinco. En la jaro 1930, lia patro mortis de turmentado de iu kapitalisto dum dorsportado de karbo. De tiam la patrino kun siaj tri gefiloj devis almozpeti ĉie por vivteno. Post nelonge la malpli-ol-unujara fratino mortis de malsato, kaj la alia ses-jara fratino Han Feng estis devigite vendita. Ne povante elteni kruelan turmentadon, Han Feng forfuĝis aliloken kaj almozpetis. De tiam la patrino kaj frato ne plu sciis, kie ŝi vivis. Post la Liberiĝo, Han Gjunmin fariĝis laboristo, edziĝis kaj nun havas kvar infanojn. Ankaŭ la maljuna patrino vivas feliĉe kune kun ili. Ili tre sopiris la perditan Han Feng. Lastatempe iu amiko de Han Gjunmin diris, ke antaŭ la Liberiĝo li foje preteriris Gongtan kaj vidis Han Feng, kiu tiam laboris kiel servistino de riĉulo. Laŭ tiu informo, Han Gjunmin petis helpon de la policejo por ŝin serĉi.

Post ricevo de la letero, kamaradoj de Gongtan-policejo havis profundan simpatian al la suferplena travivaĵo de la familio de Han Gjunmin. Ili esprimis, ke ili nepre faros grandan klopodon por serĉi la fratinton de Han Gjunmin. Policisto kaj kompartiano Gong Guojou prenis sur sin la taskon. La tragika travivaĵo de Han Gjunmin rememorigis al li pri la suferplena historio de sia familio. En la jaro 1952, lia 40-jara patro estis forkaptita de reakcia trupo kiel portisto. Tiam en lia familio restis ses personoj. La febla patrino kun la du pliaĝaj fratinoj vivtenis la tutan familion per penlaboro kaj falĉado de furaĝo. Ili plenigis sian stomakon per manĝaĵo kun sovaĝa legomo. Post la Liberiĝo lia familio feliĉe vivas dank' al la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Antaŭ sia morto pro serioza

malsano, lia patrino diris al la filo: “Estus bone, se via patro ankoraŭ vivus kaj vivus kune kun ni.”

La rememoro vekis al li pli fortan proletaran sentimenton. Li kaj aliaj kamaradoj de la policejo diskutis pri la rimedo por serĉi Han Feng. Unuflanke ili foliumis kaj studis la koncernajn dosierojn kaj aliflanke okazigis kunsidojn de kadroj kaj loĝantoj kaj vizitis lokajn maljunulojn. Firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ pri la tutanima servo al la popolo, ili decidis ĉiurimede serĉi karulon por la klasa frato. Ĉar transloĝiĝo de loĝantoj multe okazis en la longa tempo, ili ne sukcesis trovi Han Feng post duonjara serĉado. Gong Guojou kaj liaj kamaradoj tamen ne perdis sian fidon pri tio. Ili gluis afiŝon pri serĉo de Han Feng en la propaganda tabulo, por ke la vastaj popolamasoj liveru informon.

Aŭdinte la aferon, maljuna laboristino Ĵan Ĉongjing ekpensis, ke antaŭ la Liberiĝo iu servistino de komercisto Li Fu-an en la vilaĝo estis nomata Han Feng. Pro la neeltenebla turmentado de bato kaj malsato, ŝi almozpetante forfuĝis al Hongdu-vilaĝo de Janhe-gubernio, Gujĝoŭ-provinco. Tie ŝi fariĝis servistino de alia homo. Informiĝinte pri tio, Gong Guojou tre ĝojis kaj tuj veturis al Hongdu. Per helpo de la loka partia komitato, li mobilizis la amasojn al la serĉado kaj faris multajn enketojn. Foje, Gong Guojou aŭdis, ke en la fabriko de agrikulturiloj de Hinging-komunumo troviĝas laboristino Han Sumej, kies naskiĝloko estas ankaŭ Fuling de Siĉuan-provinco. Li persone vizitis la hejmon de Han Sumej kaj eksciis, ke Han Sumej estas neniu alia ol Han Feng. Ŝia nomo Han Sumej estis donita de instruisto en la kontraŭanalfabeteca grupo post la Liberiĝo.

En iu vespero Han Sumej intervidiĝis kun sia patrino multjare nevidita. Kiam ŝi intime kriis: “Panjo, via filino Han Feng revenis!” la maljuna patrino eĉ ne kredis siajn orelojn. Ŝi pririgardis ŝin kaj konstatis, ke ŝi vere estas Han Feng. La

filino sin ĵetis en la sinon de la patrino . . . En tiu momento ankaŭ najbaroj alvenis kaj esprimis sian gratulon al ilia tuta familio. Oni diris kortuŝite, ke la malnova socio disigis familion de malriĉuloj, sed la nova socio feliĉe kunestigis parencojn multajn jarojn disigitajn, tion oni ja ŝuldas al la Partio kaj Prezidanto Maŭ!

Kiam Han Feng feliĉe vivas kune kun siaj familianoj, Gong Guojoŭ ricevis ĝojigan novaĵon, ke lia patro estas trovita.

Iun tagon, Gong Guojoŭ ricevis telefonon el la partia komitato de Dingŝi-vilaĝo en la gubernio. Oni sciigis, ke ricevita letero de la komitato informis, ke lia patro ankoraŭ sane vivas kaj nun loĝas en Pingdu-komunumo de Anfu-gubernio, Gianghi-provinco. La neatendita informo kaj mirigis kaj ĝojigis Gong Guojoŭ. Poste la kamarado de la partia komitato detale rakontis al li, kiel lia patro estis trovita.

Lia patro estas nomata Gong Jihe. Antaŭ la Liberiĝo, li estis kaptita de reakcia trupo de Kuo-mintango kaj ĉiutage li devis ŝultroportadi ĝiajn oficirojn per portseĝo. Poste, li iris pli kaj pli malproksimen for de sia hejmloko, kaj fine alvenis al Anfu-gubernio. Tiutempe malsano kaj malsato preskaŭ rabis lian vivon. Vidante, ke li ne plu povis

labori, reakciaj oficiroj forlasis lin en iu kaduka templo. Estis feliĉe, ke iu preterpasanta malriĉulo rimarkis lin kaj kun profunda simpatio kondukis lin al sia hejmo. Poste, la malriĉulo lin resanigis. Tiam Gong Jihe tre sopiris al sia hejmo, sed li havis neniun groŝon por revena vojaĝo. Li do devis resti en Anfu-urbeto kaj portadis akvon por kelkaj restoracioj por sin vivteni. Plurfoje li petis aliajn skribi leterojn al la hejmo, tamen li ricevis neniun respondon en la malnova socio. Gong Jihe iom post iom perdis la esperon pri reveno al la hejmo kaj tie laboris kiel servisto, spertante ĉiajn suferojn. Post la Liberiĝo, la popola registaro distribuis al li teron kaj domon. Poste, kiam li perdis laborkapablon pro sia maljuneco, la popola komunumo provizis lin je ĉio necesa, por ke li feliĉe pasigu siajn lastajn jarojn. Iutage li rakontis al iu intelekta junulo, kiu venis de urbo por fiksloĝiĝi tie, sian amaran pasintaĵon kaj la feliĉan vivon post la Liberiĝo. La junulo estis kortuŝita kaj fervore skribis por li leteron al la partia komitato de Dingŝi-vilaĝo de Siĉuan-provinco por peti helpon serĉi liajn karulojn. Tuj post la ricevo de la letero, la komitato sendis personon al lia hejmloko por fari detalan enketon kaj fine trovis lian filon Gong Guojoŭ.

Nun la maljunulo kun pli ol okdek jaroj feliĉe vivas kun sia filo.



PLIPRODUKTO DE MIELO

Fusong-gubernio de Gilin-provinco situas en Ĉangbaj-montaro, kie floroj pompas printempe kaj somere, tial ĝi posedas abundajn fontojn de mielo kaj ĝiaj mielaj kvanto kaj kvalito altiĝis senĉese. En la kuranta jaro la gubernio akiris riĉrikolton de mielo kaj la ŝtato jam aĉetis 515,000 kilogramojn da mielo, kiuj estas pli-ol-6-oblo de tiu en 1970.


ARTA GENERADO DE RIVERAJ FIŜOJ

Nigra, herba kaj blanka karpoj kaj grandkapa fiŝo (*Aristichthys nobilis*) estas

ĉefaj specioj de riveraj fiŝoj en nia lando. En la pasinteco tiuj fiŝoj ne povis ellasi ovojn en lagoj por generado, do oni devis kapti fiŝidojn el riveroj por bredi ilin en lagetoj, kio ne povis kontentigi bezonon en produktado. En 1958 niaj fiŝistoj, kadroj kaj teknikistoj kune faris eksperimenton kaj sukcesis en arta generado, ĉeloka eloviĝo kaj bredo, kio favoras al laŭplana fiŝbredado kaj multe reduktis la memkoston.

En la lastaj jaroj, la vastaj amasoj de kadroj de la akvoprodukta fronto senĉese resumis la sperton, altigis kaj disvastigis la generigan teknikon, kio akcelis la disvolviĝon de nia rivera fiŝbredado. Nun tiu nova tekniko estas jam aplikita en Guangdong, Guanghi, Giangsu, Ĝegiang, Hubej, Hunan, Siĉuan, Hejlonggiang, Liaŭning, Hebej kaj Pekino.

Gravuraĵoj




La Kantona Instituto de Kamparana Movado
de Liaŭ Ĝongji





Patrolado
de Zeng Ĝaŭhin



Nova Pejzaĝo sur Gobio
de Ju Venĵa

Ĝojiga Novaĵo por
Montanoj
Kolektive verkita de
fervoja trupo de ĈPLA



Semo

de Lu Deping, Ĝaŭ Jue-ling kaj Huang Zengli



Kulturado de Novaj Homoj

de Laŭsi



Opinioj de Vizitantaj Eksterlandaj Esperantistoj

EN junio kaj aŭgusto ĉi-jare M. Sakai, vic-direktoro de la Orienta Librejo de Japanio kaj unu el la perantoj de EPĈ en Japanio (kiel gastulo invitita de Guozi Shudian), nia franca leganto Robert Martin (kiel membro de vizitanta grupo de Kultura Centro Francio-Ĉinio) kaj nia angla leganto Don Gasper (kiel membro de Junulara kaj Studenta Delegacio de la Societo por Anglo-Ĉina Interkompreniĝo) faris viziton al nia lando. Kun granda plezuro la Esperanto-laborantoj de Pekino intervidiĝis kun ili kaj utiligante la okazon petis de ili opiniojn pri El Popola Ĉinio.

S-ro Sakai opiniis, ke la artikoloj “Anestezado en Cerba Operacio per Akupunkturo” (n-ro 1 por la kuranta jaro), “Vizito al Anfeng-lago”, “La Nuna Cajdam” kaj “Kanto de Amikeco sur Bakboglobfo” (n-ro 2) estas bonaj. “Utiligo de Forĵetaĵoj en Industrio” (n-ro 3) estas interesa, sed estus pli bone se oni estus farinta pli detalan priskribon. “Kokeriko en Nokto” (n-ro 4) estas alloga. La lignogravuroj de Gu Juan aperigitaj en n-ro 5 estas tre elstaraj. La artikolo “La Administraj Distriktoj kaj Konciza Geografio de Ĉinio” en la sama numero estas helpa por la legantoj.

Samtempe li diris, ke la japanaj legantoj montras konsiderindan intereson pri la vivo de ĉina popolo, tial ili preferas artikolojn sub tiu temo. Li ankaŭ opinias, ke povas esti, ke la esprimoj “malriĉkampanoj” kaj “malsuperaj mezkampanoj”, “la kadro-lernejo de la Sepa de Majo” kaj aliaj similaj ne estas sufiĉe kompreneblaj por multaj legantoj. Krome, li opiniis, ke estus rekomendinde iom plimultigi la kolorajn bildojn de la gazeto.

S-ro Martin proponis aperigon de kurso pri ĉina lingvo kaj publikigon de artikoloj pri aferoj speciale ĉinaj, ekz., akupunkturo kaj ĉina medicino. Li ankaŭ sugestis aperigon de esperantaj tradukoj de la poemoj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj k-do Guo Moĵuo, modernaj ĉinaj literaturaj verkoj kaj iom da ĉinaj klasikaj verkoj kaj artikoloj pri edukado kaj precipe pri infana edukado en Ĉinio.

S-ro Gasper opiniis, ke El Popola Ĉinio nun fariĝas pli bona ol antaŭe. Li ankaŭ proponis

aldonon de ĉin-lingva kurso kaj krome paĝon pri internaciaj aferoj. Rilate al la enhavo li diris, ke se la artikoloj estus de diversaj temoj, tio povus kontentigi la postulon de diverslandaj legantoj.

La valoraj opinioj de tiuj ĉi eksterlandaj amikoj estas tre utilaj al nia redakta laboro kaj kuraĝigas nin plu progresi antaŭen. Ĉi tie ni refoje esprimas al ili nian koran dankon.

Ni ankaŭ volas profiti la nunan okazon por meti postulon al ĉiuj niaj eksterlandaj legantoj, t.e., ni tre esperas, ke ili ofte skribos al ni siajn opiniojn aŭ proponojn koncerne al la enhavo de El Popola Ĉinio kaj tiamaniere helpos nin en la plibonigo de nia gazeto.

Aŭskultu

Esp-an Disaŭdigon

de

Radio Pekino

Por Eŭropo

GMT	Vendredo k Sabato 20:00—20:30
Ondoj(m)	47 45 31 25

Por Japanio, Koreio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 19:00—19:30
Ondoj(m)	47 40

Por Sudorienta Azio

Pekina Tempo	Sabato k Dimanĉo 20:30—21:00
Ondoj(m)	25 19

Arbido

(Prozaĵo)

MI ricevis taskon transporti junajn “pekinajn poplojn” ĵus elvagonigitajn al Janglin-komunumo.

Kiam mi estis ekveturonta, al mi kuris Maljuna Ĝang de la gubernia buroo de agrikulturaj kaj forstokulturaj aferoj kun iu junulo. Portante lignan keston sur sia ŝultro, la junulo altstatura kun sunbruna vizaĝo kaj larĝaj ŝultroj rapidis per grandaj paŝoj. Maljuna Ĝang petis ke mi portu la junulon al Ŝicun-vilaĝo, dirante, ke li estas intelekta junulo de Pekino transiĝinta al kamparo kaj ĵus ĉeestis la kunvenon de forstokulturaj aferoj kaj tiel deziregas tuj reveni, ke li eĉ ne volas atendi la aŭtobuson!

Por veturi al Janglin oni devas preterpasi Ŝicun-vilaĝon, mi tuj konsentis kaj helpis lin enaŭtigi la lignan keston. Ha! La kesto pezis pli ol 40 kilogramojn, ja nemolaj estas la ŝultroj de la junulo! Kaj mi demandis lin senpripense: “Kial vi ne atendas la aŭtobuson, tiom konforman kaj nemalvarman?”

“Multaj aferoj min atendas hejme!” tuj li respondis. “Ĉu vi jam fondis hejmon tie?” Mi demandis refoje.

Li serene ridis dirante: “La produkta grupo ja estas mia hejmo!”

Jam estis tempo por forveturi. Mi invitis lin al mia kajuto, tamen li sidiĝis sur la ŝarĝplato sin volvinte per sia vatita jako. Apud li kuŝis la ligna kesto kaj antaŭ liaj piedoj pli ol duonkamiono da arbidoj. “Kamarado, mi sidu ĉi tie.” Li aspektis neŝancelebla. Mi demandis lin pri la kaŭzo kaj li diris palpebruminte: “Por rigardi pejzaĝon!” Tion aŭdinte mi ekridis.

La pejzaĝo en la kamparo ja estas tre bela. Ĵus neĝis, kaj la matena suno orumis la arĝentan kamparon.

La sterkotransportantaj komunumanoj iras en linioj kvazaŭ longa drako malproksime serpen-

tumanta. Ili estas aranĝantaj la duan printempon de la sepdekaj jaroj!

Janglin situas post granda monto, je pli ol 50 kilometroj fore de la gubernia urbo. En tagmezo, ni atingis la urbeton Ŝanmenĝen. Mi saltis el la kajuto kaj invitis la junulon al manĝejo. Tamen, li ekmanĝis sekajn mantoŭ-ojn*. Mi demandis, kial li ne iras manĝi varman vermiĉelon, li diris serene: “Mi kutimiĝis al tio ĉi.”

Li sciigis al mi: Por rapidigi la konstruadon de ŝtuparkampoj kaj fosadon de fiŝskvamformajn kavojn, li loĝis kune kun komunumanoj sur la monto tutan vintron en la lastaj jaroj, manĝante kaj dormante sub la firmamento. Liaj vortoj kvazaŭ fontakvo fluis en mian koron kaj sciigis al mi, kiel li hardiĝas kaj kreskas en la kamparo. . .

Kiam mi diris, ke Ŝicun-vilaĝo estas avangarda produkta brigado fame konata en la gubernio, li respondis sonore kvazaŭ metalaĵo falus surtere: “Ho jes, tamen, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris, ke ĝi ankoraŭ estas postiĝinta! Kvankam ni vivas en montaro, tamen nia koro entenas la tutan Ĉinion!”

Li kvazaŭ havis ion por diri, tamen li ekfikse rigardis min kaj abrupte prenis mian manon kvazaŭ ion rimarkinte: “Ĉu vi ne rekonas min, k-do ŝoforo?” Mi surpriziĝis kaj esplorigardis lin, tamen mi ankoraŭ ne povis rekoni lin.

“Ĉu ne estis vi, kiu transportis per kamiono la pekinajn intelektajn junulojn de la gubernia urbo al Ŝicun-vilaĝo antaŭ tri jaroj?”

“Jes ja . . .”

“Ĉu tiam ne estis iu junulo kun pentroteko, kiu kriis survoje, ke li volas pentri pejzaĝon?”

“O! Tiu estis vi? Jes, jes, vi petis haltigi la aŭton, sed tion mi ne faris. . . Ha, tiam vi estis kaj blanka kaj malgrasa, mi ja. . . Ĉu vi ankoraŭ pentras?”

“Jes!” La junulo diris fiere: “Mi faras propagandon, murpentraĵojn, kaj — jen vidu la kontraŭajn dezertajn montojn, ni plene transformos ilin, kaj pentros hele verdan koloron ĝis iliaj pintoj!”

Verdigo!?! Mi ne povis deteni miajn pensojn, kaj imagis al mi la ĉarman aspekton de la montvilaĝo post kelkaj jaroj: verda montaro, ora kamparo kaj brila vivo. . .

Mi haste prenis manĝon kaj poste tiris la junulon al la kajuto. Antaŭe lia vizaĝo ruĝiĝis pro frosto kaj posttagmeze la vento pli fortiĝis, do li neniel devis sidi ekstere. “Vi same povos rigardi pejzaĝon sidante antaŭe.”

Tiam, li levis siajn brovojn kaj kun brilaj okuloj li diris serioze montrante la lignan keston kaj arbiĉojn: “En tiu ĉi kesto estas disaŭdigilo, kiun atendas nia vilaĝo por aŭskulti la pekinan voĉon: la arbidoj estas pekinaj poploj, mi plantis multe da tio dum la lastaj jaroj, kaj jam konas ilian karakteron. Vi rigardu, ke ili jam burĝonis. Hodiaŭ la vojo estas tiom malfacila, ke la kamiono forte balanciĝas. Sidante inter ili, mi povas zorgi ilin, ĉu ne?”

Jen la kaŭzo. Mi ne sciis kion diri kaj prenis ŝafpeltan surtuton el la kajuto kaj kovris per ĝi lian dorson. . .

La vojo serpentumas inter la montoj starantaj unu apud la alia. Ĉiu el la branĉoj de la ĵus burĝonintaj poplidoj starantaj apud la vojo sin direktis al la serena firmamento; per sia viveco ili anoncas la alvenon de printempo!

Atinginte Ŝicun-vilaĝon, mi helpis la junulon surŝultrigi la lignan keston kaj adiaŭis lin kun bedaŭro. Sur la neĝkorvita vojo, li antaŭeniris kun la kesto sur la ŝultro. . .

Mi veturis antaŭen plu. Subite venis al mi la penso, ke mi forgesis demandi pri la nomo de la junulo. Poste, mi konsoliĝis per alia penso, ke li jam fikse loĝiĝis en la montvilaĝo kune kun la de li propramane plantitaj “pekinaj poploj” do estos nemalmultaj ŝancoj por mi renkontiĝi kun li.

*mantoŭ-o: pano-simila manĝaĵo preparita per vaporumo anstataŭ bakado



FRUKTOJ DE AGRONOMIA ESPLORADO

En Ŝandong-provinco, amasa aktivado de agronomia eksperimentado estas energie disvolvata. Laŭ nekompleta statistiko, nun en la tuta provinco pli ol 36,000 produktaj brigadoj jam fondis taĉmenton de scienca eksperimentado, pli ol 110,000 produktaj grupoj jam fondis tian grupon kaj unuapaŝe formiĝis armeo de scienca eksperimentado. La pli ol 20 agronomiaj institucioj de la tuta provinco konstante sendas siajn sciencajn laborantojn al bazaj

unuoj kaj krome ĝiaj pli ol 540 sciencaj laborantoj fondis pli ol 150 permanentajn punktojn en vilaĝoj, forstejoj kaj fiŝistaj vilaĝoj por fari sciencajn eksperimentojn kune kun lokaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Laŭ nekompleta statistiko, pli ol 300 relative gravaj fruktoj de la agronomia esplorado estas akiritaj en la tuta provinco, depost la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio. La disvolviĝo de scienca eksperimentado akcelis sinsekvajn pliprodukton de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, flankaj okupoj kaj fiŝkaptado. En la pasinta jaro, la pomua produktokvanto kaj totala produktokvanto de greno de la tuta provinco ambaŭ superis la plej altan nivelon en la historio kaj relative grandan disvolviĝon ricevis la kulturado de kotono, arakidoj kaj tabako. En la kuranta jaro riĉa rikolto de tritiko estas akirita denove.

Adiaŭ al Montego



LI JING

*Formarĝos nia trup' de l' monto. Je la adiaŭa horo,
neesprimeblan emocion sentas mi en koro.*

*Sur arbopintoj nuboj pendas,
sur mont' nebulo sin etendas.
Ĉu ili timas, ke mi vidos: la karuloj
ĉi-lokaj larmojn rulas en l' okuloj?*

*Subite mi memoras pri la horo de l' alveno.
Ja ĉio vere ŝajnas al mi hieraŭa sceno!*

*Hodiaŭ mi forlasos vin, ho, kvazaŭ panjon karan;
montego, vi min nutris jam tri plenajn jarojn.
La amo de l' montanoj al ni tiel fajre ardis,
ke spite mortdanĝeron ili kun ni limpasejon gardis.*

*Kiom da tagaj, noktaj scenoj ĉiam restas en mia memoro,
printempe l' monto, aŭtune l' akvoj varmis en la koro.*

*Trijare, sur la vojoj samaj ni iradis,
trijare l' firmamenton saman ni subtenis,
por ebenigi kampojn ni peneme ŝpatis,
ĉe sama gardstarejo ni laŭ vic' postenis.*

*La popolanoj ĉiuj havas ruĝan koron,
kaj ĉiu dolĉa frag' ellasas bonodoron.*


*Mi ŝatas la aromon de rezin' montaran,
mi bone konas ĉiun digon kaj barajon,
mi scias la infanojn de ĉiuj familioj,
mil birdojn mi distingas per iliaj krioj.*

*Kun la tornistro dorse, karaj, mi vin ja forlasos,
kaj maltrankvilos, se nenion mi al vi donacos.*

*Mi donas novan ponton al la montrivero,
mi donas novajn vojojn al la blua ĉielo,
mi donas verdajn arbojn al ĉiuj birdetoj,
kaj fontan akvon al la rizplantidaj bedoj. . .*

*Hodiaŭ, riverfluojn plurajn mi travados,
ĉi-nokte, sur alia monto mi kampados.
Eĉ se mil liojn fore de vi mi forestos,
kaj nuboj kaj nebuloj jam nin apartigos,
mi arbo de l'montego por eterne restos
kaj la radikojn miajn firme kun vi ligos.*

*Post ĉiu paŝo l' batalantoj ame rerigardas,
en sonĝ' ilian koron la montanoj dolĉe gardas. . .*



La Botanika Ĝardeno de Hangĝoŭ



Metasekvojoj en la botanika ĝardeno

LA Botanika Ĝardeno de Hangĝoŭ situas ĉe la Okcidenta Lago, kiu allogas vizitantojn per siaj abundaj specioj de vegetaĵoj. La ĝardeno okupas 250 hektarojn da tero kaj kreskigas pli ol 3,000 speciojn da vegetaĵoj en- kaj ekster-landaj. Laŭ iliaj malsamaj ekologio kaj naturo, familio kaj genro, oni dividis la vegetaĵojn en la zonojn de ornamaj vegetaĵoj, ekonomiaj vegetaĵoj, sistematikaj vegetaĵoj, bambuoj, arboj, eksperimento pri transplantado kaj generado, kaj fruktarboj.

AROMAĴO DE TUALETSAPO

En la zono de eksperimenta arbidkulturado, kreskas rokrozo (*Cistus*) deveninta de Mediteraneo. Ĝi estas arbedo homstature alta, kun folioj iom similaj al tiuj de plorsaliko, kaj surhavanta oleon brilantan sub sunradioj. En serenaj tagoj oni povas flari ĝian agrablan aromon de malproksime. Oni uzas ĝin kiel materialon por fabriki tualetsapon.

Pratempe, kiam rokrozo kreskis sur insuloj en Mediteraneo, ĝi estis sovaĝa arbedo, kiun oni falĉis ĉiujare. Nun, la laborantoj de la ĝardeno selektis kaj konservis la plej bonajn speciojn el tiuj senditaj

de pluraj landoj, kaj post zorgema eksperimentado oni jam komencis ĝin planti kaj kulturi. La aromaja eksperimenta laborejo de la ĝardeno fabrikas ekstraktaĵojn de rokrozo kaj liveras ĝin al iuj unuoj de nia sapa kaj tualeta industrio.

VIVA FOSILIA VEGETAĴO — METASEKVOJO

Ĉe iu bela lotusa lageto staras arboj kun ruĝa ŝelo, alta kaj rekta trunko, mallongaj branĉoj, kaj plataj, mallarĝaj kaj plume viciĝantaj folioj. Ili estas metasekvojoj (*Metasequoia glyptostroboides*) — vegetaĵoj postlasitaj de la antikva epoko kaj trovitaj en la kuranta jarcento.

Antaŭ la trovo de metasekvojo, botanikistoj asertis, ke ĉiuj metasekvojoj jam mortis pro frosteco en la glacia epoko de geologia historio. Dum la lastaj ĉ. 100 jaroj, en iuj tertavoloj de Eŭropo, Azio kaj norda Ameriko, oni ofte trovis multajn vegetaĵfosiliojn, kiuj estas similaj al sekvojo (*Sequoia sempervirens*) kreskanta en Usono kaj siatempe vekis dubon ĉe diverslandaj botanikistoj. Kvankam la klimato de norda poluso antaŭ cent milionoj da jaroj estis milda, tamen oni ne povis imagi, ke en la regiono de norda poluso troviĝis ĉielskrapa arbaro kiel sekvojo

en Usono. Poste, niaj botanikistoj trovis metasekvojn en Vanhian de Siĉuan kaj Liĉuan de Hubej.

Je la komenco metasekvojo kreskis en Grenlando antaŭ cent milionoj da jaroj, poste ĝi iom post iom translokiĝis suden kaj ĝiaj diversaj specioj povis esti trovitaj ankaŭ en Eŭropo, Azio kaj norda Ameriko. Ĝis antaŭ dudek milionoj da jaroj ĝi iom post iom malaperis en diversaj lokoj, kaj postvivis nur en apartaj lokoj de nia lando.

Post kiam ni trovis metasekvojn, nia lando kolektis grandan kvanton da ĝiaj semoj kaj sendis ilin al botanikaj esploraj institutoj de iuj landoj por eksperimenta kulturado. Ĉar metasekvojo taŭgas al forstumo en akvoabundaj regionoj ĉe la baseno de Jangzi-rivero de nia lando, la Botanika Ĝardeno de Hangĝoŭ, post atenta esplorado, aplikas branĉan plantadon por generi metasekvojn, kaj ĉiujare liveras multajn arbidojn al diverslokaj popolkomunumoj.

FLORO DE AMIKECO

Kun senĉesa disvolviĝo de amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, la Botanika Ĝardeno de Hangĝoŭ jam starigis interrilatojn kun botanikaj ĝardenoj de kelkdek landoj, kaj interŝanĝas kun ili semojn de diversaj vegetaĵoj.

Tie troviĝas oleolivo (*Olea Europaea*) kaj laŭro (*Laurus nobilis*), kiujn Albanio donacis al nia lando. Oleolivo estas unu el famaj lignecaj oledonaj vegetaĵoj, kies oleenteno estas pli abunda ol tiu de sojfabo kaj arakido, kaj povas kuraci malsanojn de hepato kaj stomako. La folioj de laŭro enhavas apartan aromajn kaj estas famkonata spicaĵo kaj aldonaĵo nemankigebla por fari viandajn enladigitajn kaj aliajn de manĝaĵa industrio.

Tie estas vegetaĵoj devenintaj de Koreio kaj Vjetnamio, de Eŭropo, Aŭstralio kaj Ameriko.

Printempon de la kuranta jaro, kiam la usona prezidanto vizitis nian landon, li kunportis arbidojn de sekvojadendro (*Sequoia dendron giganteum*) kaj sekvojo (*Sequoia sempervirens*) — la famaj usonaj arbospecioj por ligno kaj ornamo. Tiuj du plantaĵoj estas kreskantaj en la ĝardeno.

KURACAJ VEGETAĴOJ

Ĉinio havas longan historion en apliko de vegetaĵoj por kuraci malsanojn. La libro pri kuracaj drogoj *Ŝennong Ben Caŭ* estis verkita antaŭ 2,000 jaroj, kaj la fama farmakologia libro *Ben Caŭ Gang*

Mu verkita de *Li Ŝiĝen* de Ming-dinastio trovis plurlingvajn tradukojn en la mondo.

En la zono de ekonomiaj vegetaĵoj de la ĝardeno oni plantas pli ol 1,000 speciojn da tradiciaj kuracaj vegetaĵoj. La kamaradoj de la ĝardeno faras esploradojn kaj studadon pri iuj kuracaj herboj kun alta kuracefiko en biologio kaj kulturado. Iu herba hedereca vegetaĵo simila al sovaĝa vinbero estas nomata de popolaj kuracistoj “ŝanjeking” (“tri verdaj folioj”) pro ĝiaj tri kunmetitaj folieroj. La lagenariforma tubereto sur la pinto de ĝia radiko estas drogo por kuraci infanan febron. Alia herbeca vegetaĵo futon alta estas nomata de la popolaj kuracistoj “bejgiegu”, kiu povas kuraci ostrompiĝon post ŝmiro de ĝia pistitaĵo kun salo kaj firma bandaĝo.

Antaŭ 20 jaroj Botanika Ĝardeno de Hangĝoŭ estis tombejo plena de sovaĝaj herboj. Nun, ĝi jam fariĝis bela ĝardeno orde aranĝita, kie oni kulturas diversajn vegetaĵojn kaj faras kontribuon por scienca esplorado, verdigo de la patrolando kaj servo al la vasta laboranta popolo.

La zono de drogherboj



Oleargilaj Modlaĵoj

EN la urbo Venĝoŭ en la malsupra baseno de Oŭĝiang-rivero en nia Ĝegiang-provinco sin trovas la Venĝoŭ-a Fabriko de Oleargilaj Modlaĵoj, kiu famiĝas pro produktado de unikaj artaĵoj. Veninte en ĝian laborejon oni povas tuj vidi, ke junaj kaj veteranaj metiartistoj absorbite faras modlaĵojn. Ĉi tie troviĝas eningitaj ekranoj, kiuj spegulas belajn pejzaĝojn de nia lando, soklaj ekranoj kun plastikaj homfiguroj kaj diversaj grandaj ĉirkaŭekranoj modlitaj en nova arta stilo. Ĉiuj tiuj variaj artaĵoj ĉarmas per sia belo.

La oleargila modlo estas sinteza arto inter la tradiciaj metiartoj de nia lando. Ĝi kombinis la teknikojn de pentrado, modlado kaj skulptado en kreo de metiartaĵoj de aparta stilo. De malgrandaj artaĵoj kun grandeco de 0.1 kvadrata metro ĝis grandegaj artaĵoj kun grandeco de 10 kvadrataj metroj, ĉiuj karakteriziĝas per freŝeco de koloroj, klareco de perspektivo kaj versimileco de la prezentitaj substancoj kaj havas similecon de pentraĵoj en kolorriĉeco kaj de skulptaĵoj en relieffeco.

La oleargila modlarto naskiĝis en King-dinastio (1644-1911 p. K.). Tiam popolaj metiartistoj de

Venĝoŭ modlis ornamaĵojn de lignaj objektoj kaj budaaj figuroj surbaze de la arto de argila modlado de antikvaj budaaj figuroj, aplikante teknikon de farado de lakaj objektoj de Fugian, kaj iliaj produktaĵoj ricevis bonvenigon. Ĉar la modlaĵoj de lako-argilo estis unukoloraj kaj ne povis formi memstaran metiarton, la popolaj metiartistoj aplikis la teknikon de pasta modlarto, anstataŭ lakoargilo uzante oleargilon kun diversaj enmiksitaĵoj farboj, tiel ke oni povas fari buntajn artaĵojn. Ĉar oleargilo estas fortika kaj malfacile rompebla, la modlaĵoj faritaj el ĝi ne facile defalas de la fono kaj povas esti longe konservataj, tial ili estas ŝatataj de ĉiam pli multaj artaj aprecantoj.

Post la Liberiĝo, sub la direktado de la principo de Prezidanto Maŭ **“kune floru cent floroj; elvolu novon el malnovo”**, la metiartistoj de Venĝoŭ organizis sin en la Kooperativo de Oleargilaj Modlaĵoj por disvolvi tiun unikan metiarton. De post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio novaj kaj veteranaj metiartistoj iris al kamparo, montaj kaj fiŝbredaj regionoj, fabrikoj, minejoj kaj pitoreskejoj por fari ĉelokajn projektadojn. Dank’ al tio rimarkinde altiĝis ilia arta nivelo. He-




EN la nordokcidenta parto de Jiĉun-gubernio de Gianghi-provinco troviĝas Ginĵuj-poŝtofiĉejo. Ĝi havas nur 6 laborantojn, sed plenumas servon al 9 brigadoj, 1 urbeto kaj pli ol 40 fabrikoj, minejoj, lernejoj kaj oficejoj en la 50-kilometra ĉirkaŭaĵo. Tie multas montoj kaj montetoj kaj trafiko estas tre malfacila, tamen ĝia laboro estas tre bone plenumita, kaj pro tio ĝi estas ĉiujare elektita kiel avangarda kolektivo.

Edifo de Pakajoj

En la somera rikoltado de 1969, ĝi ricevis pakajon adresitan al komunumano en la regiono. Oficisto sendis sciigon al la adresato laŭ la regularo, sed neniu venis por preni la pakajon. Post kelkaj tagoj oni sendis sciigon al li refoje, sed ankoraŭ neniu venis. Kaj la adresato venis nur post pli ol duonmonato. “Pro kio vi prokrastis tiel longe?” demandis oficisto. “Ĉu mi povus veni por preni la pakajon en tiom streĉaj someraj rikoltado kaj semado forlasante la kolektivon laboron?” respondis la komunumano.

La afero meditigis ĉiujn de la poŝtofiĉejo. Kaj pri tio Ĉen Kun, sekretario de la partia filio, donis apartan atenton. Ili pensis: “Por kolektiva produktado, la komunumanoj povas eĉ forgesi individuan aferon. Kial do ni, servantoj de la popolo, ne povas sendi pakajojn kaj aliajn poŝtaĵojn rekte al la amasoj.”

Ĉu oni devas atendi la adresatojn aŭ sendi pakajojn al ili? Pri tio la poŝtoficistoj kondukis varman diskuton en tiu vespero. Post la diskutado, ili komprenis,



redante la tradicion ili kuraĝe renovigis la teknikon laŭ sia socia praktiko kaj kreis nemalmultajn grandajn metiartaĵojn, atinginte ĝojindajn sukcesojn. La verko *Ŝaiŝan* sukcese kreita en la komenco de la kuranta jaro estas unu el ili.

La ekrano *Ŝaiŝan* altas je 2.1 metroj kaj larĝas je 3.1 metroj. Per sia kolektiva saĝo metiartistoj modlis ĝian bildon de ĉirkaŭantaj montoj, densaj verdaj bombuaroj, majestaj pinoj kaj buntaj floroj. La ĉefa temo de tiu verko estas elstara. La ĉirkaŭa pejzaĝo ornamas la naskiĝdomon de Prezidanto Maŭ, kvazaŭ sennombraj steloj ĉirkaŭas la lunon, tiel

ke okulfrapas la nova fizionomio de la domo. En arta tekniko la metiartistoj aplikis krudan stilon por modli foran ĉielon, proksimajn arbojn, sunradiojn, nebulon kaj elstarigis la domojn kaj homojn per tekniko de ĉinstila pentrado kaj skulptado, tiel ke la verko faras neordinaran efekton kaj en arta formo kaj en ideo.

Krome la pitoreska *Jandang-montaro*, la revolucia sankta loko *Jan-an* nove kreita de junaj metiartistoj kaj *Hidroelektrajo de Hin-an-rivero* zorge modlita de veteranaj artistoj estas multe laŭditaj de spektantoj.



ke ili faris ankoraŭ malmulte en servo al la popolo kaj ne devas kontentiĝi pro gajno de la titolo “avangarda kolektivo”.

Sub la gvido de la partia filio, ĉiuj kamaradoj decidis rompi la malnovan regularon “atendi la adresatojn” kaj starigi novan “sendi poŝtaĵojn al ili”. La oficistoj sendas rekte al la adresatoj ĉiujn pakajojn, sendatan monon kaj specialajn rekomenditajn leterojn, kiuj antaŭe devis resti ĉe la poŝtoŝeĵo. Ili ankaŭ kunportas poŝtmarkojn, kovertojn kaj aliajn bezonaĵojn al la amasoj, kaj abonas ĉeloke ĵurnalojn kaj gazetojn por ili, akceptas diver-

sajn poŝtaĵojn kaj kolektas pagojn por telegramoj kaj telefono.

Pro tio, la sakoj de la letersendistoj plipeziĝis kaj iliaj vojoj pli longiĝis, tamen iliaj helpoj al la konstruado de nova socialisma kamparo pli kaj pli grandiĝas.

En somero de la lasta jaro, la oficejo ricevis poŝtmandaton adresatan al iu izola loko for de la poŝtovojo. Por ne prokrasti deĵoran laboron, la poŝtisto Nje Ginjong sendis la monon al ĝia adresato en libera tempo malgraŭ la varmega suno. Je alia kazo li iris 6 fojojn por trovi maljunan onklinon de Fengŝan-brigado kaj doni al ŝi la sendatan monon.

Nun, la amasoj de la regiono povas aboni ĵurnalojn kaj gazetojn, sendi leterojn kaj monon en sia vilaĝo, preni kaj sendi pakajojn en sia hejmo, kaj mendi longdistancon telefonon kaj telegramon en sia brigado. Dum pli ol du jaroj, ili ricevis kaj sendis pli ol 5,000 poŝtaĵojn, dekmilojn da juanoj da sendata mono, tute senerare dank’ al sia zorgemo.

La spirito de la poŝtoficistoj en servo al la popolo de la montregiono ricevis varman laŭdon de la amasoj, kaj ili ankoraŭ pli altigis sian konscion de tutkora servo al la popolo.

“Deklaracio de Georgetown”

LA Konferenco de Ministroj de Eksteraj Aferoj de Nealiancitaj Landoj okazis de la 8-a ĝis la 12-a de aŭgusto en Georgetown, la ĉefurbo de Gvajanio. La partoprenantoj en la konferenco estis delegacioj de 59 membroj-ŝtatoj, 12 delegacioj de observantoj kaj 8 invititaj gastoj.

Post 4-taga varma diskutado, la konferenco adoptis la “Deklaracion de Georgetown”, la raportojn de ĝiaj politika komitato kaj ekonomia komitato kaj serion da rezolucioj pri la problemoj de Hinduĉinio, la Meza Oriento, nekoloniigo, Puerto Riko k.t.p. Tiuj dokumentoj esprimas solidarecon kun kaj subtenon al la hinduĉiniaj popoloj en ilia justa nacisava batalo kontraŭ usona agreso, al la palestina kaj aliaj arabaj popoloj en ilia justa batalo kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj, kaj al la landoj kaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiuj suferas agreson kaj intervenon de imperiistoj, en ilia justa batalo por defendi nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon. Tiuj dokumentoj ankaŭ forte kondamnas la superpotencojn pro ilia praktiko de hegemonio kaj ilia redivido de influaj sferoj en la mondo.

Retrorigardante la internacian situacion, la deklario diris: “La aspiroj de multaj landoj por sendependece kaj por defendo de ilia suvereneco super iliaj naturaj riĉfontoj fariĝis ankoraŭ pli fortaj kaj pli klaraj.” Ĝi diris: “La konferenco atentis progresadon de naciliberigaj movadoj kiuj batalas kontraŭ imperiismo kaj nov-koloniismo, kaj de ilia rezistado kontraŭ agreso.” Ĝi diris: “Estas necese daŭrigi fortigon kaj disvastigon de tiuj unuiĝo kaj kunlaborado inter ĉiuj fortoj kontraŭ imperiismo kaj koloniismo.”

Ĝi diris: “Kvankam okazis mildiĝo en la streĉa situacio en la rilatoj inter grandaj potencoj kaj pliboniĝo de la situacio en Eŭropo, tamen kres-

kis ankoraŭ pli forta konkuro inter ili en iuj aliaj regionoj, precipe en maroj kaj oceanoj. Estas necese daŭrigi klopodojn por disigi la militajn aliancojn elkovitajn el konfliktoj de grandaj potencoj. La mildiĝo manifestaciita en la nuna tempo ne povis garantii ke aliloke ne estos intervenoj, subfosoj kaj rivalado inter grandaj potencoj, kvankam la paco en kelkaj lokoj estas akcelata.”

La deklario diris: “La ministroj de eksteraj aferoj atentigis pri la daŭrigo de agreso en diversaj partoj de la mondo, precipe en Hinduĉinio, en la Meza Oriento kaj en Afriko. La fortoj de imperiismo, koloniismo, nov-koloniismo kaj rasismo daŭre intencas konkuri la popolojn batalantajn por libereco kaj sendependece.” La deklario diris: “La konferenco ripetis la postulon por forigi ĉiujn fremdlandajn militajn bazojn en diversaj regionoj de la mondo inkluzive de Azio, Afriko kaj Latinameriko, precipe tiujn establitaĵojn aŭ konservitajn kontraŭ la volo esprimita de koncernaj landoj.”

Pri la situacio de Hinduĉinio, la deklario diris: “La ministroj de eksteraj aferoj esprimis sian solidarecon kun la batalo de la heroaj popoloj de Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso por ilia rajto de memdecido. Tiuj popoloj suferis difektojn de milito dum jardekoj kaj nekalkuleblajn perdojn kaj de homoj kaj de materialoj. Sed la kruela milito lanĉita kontraŭ la popoloj de Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso nur fortigis ilian volon. Estis kuraĝige ke ili daŭrigas sian batalon kun nova energio kaj persisteco. La ministroj de eksteraj aferoj konvinkiĝis ke la popoloj de Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso fine gajnos venkon en sia justa batalado.”

Pri la korea problemo, la deklario diris: “La konferenco notis kun kontento la unuapasaĵojn



Inaŭguro de la Konferenco de Ministroj de Eksteraj Aferoj de Nealiancitaj Landoj en Georgetown

rezultojn akiritajn por paca reunuiĝo de Koreio. Por akceli efektivigon de la propono de la korea popolo, la konferenco postulas ĉesigon de ĉiuj eksteraj intervenoj en ĝia afero. La konferenco postulas pluapase retiriĝon de ĉiuj eksterlandaj fortoj.”

Pri la problemo de la Meza Oriento, la deklaro diris: “La konferenco donis specialan atenton al la ekzameno pri la danĝera situacio en la Meza Oriento. Ĝi kondamnas Izraelon pro ĝia daŭra okupado de arabaj teritorioj, kaj asertas sian firman subtenon al la justa afero de la arabaj landoj kaj la justa batalo de la arabaj popolanoj en Palestino por la restarigo de iliaj naciaj rajtoj.”

Pri la afrika problemo, la deklaro montris: “La afrika popolo havas nenian alternativon ol fortigi sian armitan batalon.” Ĝi diris: “La konferenco reasertis sian solidarecon kun la batalo de ĉiuj popoloj kiuj estas ankoraŭ sub kolonia regado aŭ estas viktimoj de la kruela politiko de ras-apartigo. En tiu flanko, la konferenco esprimis

plenan subtenon al la batalo de la popoloj de Gvineo (Bissau) kaj Kabo Verde, Angolo, Mozambiko, Zimbabveo kaj Namibio por akiri nacian sendependecon, kaj al la batalo de la popoloj de suda Afriko kontraŭ la rasisma kaj faŝisma politiko praktikata de la pretoria reĝimo.”

La deklaro diris: “La liberiga procezo en landoj sub kolonia regado jam atingis decidan etapon. La koloniaj reĝimoj, firme subtenataj de iuj grandaj okcidentaj landoj, sovaĝe subpremas la naciliberigajn movadojn, tute ignorante la kontraŭkoloniajn decidojn adoptitajn de la internacia komunumo, organizas kaj subtenas internaciajn koloniismon kaj rasismon, kuraĝigas kaj antaŭenpuŝas intrigojn kaj artifikojn por daŭrigi sian regadon super la subpremataj popoloj kaj malhelpi ilin en kupto de siaj neforigeblaj rajtoj. La koloniismaj kaj rasismaj reĝimoj en suda Afriko subtenataj kaj instigataj de internacia imperiismo faras konspirojn, provokojn, intervenojn kaj renversojn kontraŭ sendependaj afrikaj landoj, kiaj

la Respubliko de Gvineo, la Unuigita Respubliko de Tanzanio, Zambio, la Popola Respubliko de Kongo kaj Senegalio. La konferenco esprimis plenan solidarecon kun tiuj landoj, kiuj estas aŭ ĉiam estas celo de malamika agado fare de imperiismo, koloniismo kaj rasismo.”

Pri la problemo de Latinameriko, la deklaro diris: “La konferenco ekzamenis la situacion en Latinameriko kaj esprimis plenan subtenon al la Ĉilia Registaro de Popola Unuiĝo, kiu klopodas por solidigi sian nacian sendependecon kaj konstrui novan socion; al la naciismaj aranĝoj aplikitaj de la perua registaro kaj ĝiaj klopodoj por defendi la nacian suverenecon kaj akceli socian progreson; kaj ankaŭ al la klopodoj de la popolo kaj registaro de Panamo por defendi ilian teritorian integrecon. La partoprenantoj bonvenigis la ĉiam pli fortajn klopodojn faritajn de la latinamerikaj popoloj por preni iliajn naturajn riĉfontojn, gardi ilian suverenecon kaj defendi la interesojn de iliaj landoj. La membro-ŝtatoj unuvoĉe konsentis, ke la realigo

de plena kaj vera sendependeco de Latinameriko estas esenca elemento en la ĝenerala emancipa proceso de la disvolviĝantaj landoj kaj en la fortigo de la internaciaj paco kaj sekureco.”

La deklaro diris: “La ministroj de eksteraj aferoj de nealiancitaj landoj solene deklaris, ke ili firme decidis daŭrigi sian senĉesan bataladon por monda paco, oponi kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj nov-koloniismo kaj ĉiuj formoj de agreso, elradikigi plene kaj por ĉiam la kolonian sistemon, ras-apartigon kaj rasismon, fortigi internacian sekurecon, krei internacian ordon kiu kontribuos al klopodoj de iliaj popoloj por gajni ekonomian kaj socian disvolviĝon, kaj forviŝi malsategon, mizeron kaj malklarecon.”

La “Deklaracio de Georgetown” kaj serio da rezolucioj esprimis la volon de la registaroj kaj popoloj de la nealiancitaj landoj. Ili vokis ĉiujn membrojn-ŝtatojn strikte kunlabori kaj klopodi por efektiviĝi tiujn rezoluciojn.



MOZAMBIKAJ PATRIOTAJ ARMITAJ FORTOJ EKSTERMIS MULTAJN MALAMIKOJN

La mozambikaj patriotaj armitaj fortoj ekstermis nombron da portugalaj koloniaj trupoj en Niassa-provinco en junio kaj julio, 1972.

En la 4-a junio, la gerilanoj detruis la fervojon inter Katur kaj Belem, difektis 8 varvagonojn kaj mortigis pli ol 20 malamikojn.

La gerilanoj faris ankaŭ plurfojajn atakojn kontraŭ la kampadejoj kaj gardejoj, suferigante seriozajn perdojn al la portugalaj malamikoj.

EKVADORA MILITŜIPO SERĈAS LA ENTRUDIĜINTAJN USONAJN FIŝKAPTAJN ŜIPOJN

En la 24-a de aŭgusto la Ĝenerala Komandejo de la Ekvadora Mararmeo

anoncis, ke la Ministrejo de Naturaj Provizoj raportis la trovon de la usonaj fiŝkaptaj ŝipoj sur la maroj apud Galapagos-insularo, kaj la mararmeo tuj sendis ŝipojn por fari patroladon kaj serĉadon.

La ekvadora mararmeo fortigis patroladon sur la maroj apud Galapagos-insularo por defendi la maran suverenecon je 200 mejloj.

PALESTINAJ GERILANOJ MULTFOJE ATAKIS LA IZRAELAJN AGRESANTOJN

Je la lasta tagdeko de aŭgusto, la palestinaj gerilanoj faris plurajn atakojn kontraŭ la izraelaj agresantoj sur Golan-altaĵo, kaŭzante multajn perdojn, vundojn kaj mortojn al la lastaj.

En la 20-a kaj 30-a de aŭgusto, la gerilanoj embuskis la malamikojn en la regiono Saad Battah kaj sur la vojo apud Dabouriyah sur Golan-altaĵo. Unu malamika veturilo estis difektita kaj ĉiuj malamikoj sur ĝi ekstermitaj.



Batalantoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio

NOVAJ SUKCESOJ DE LA VJETNAMA POPOLO

La nordvjetnama popolo akiris brilajn sukcesojn en ĝia rezistado kontraŭ la atakoj de aviadiloj kaj militŝipoj de la usona imperiismo.

Depost aprilo, 1972, la usona imperiismo, por savi sin el fiasko en la suda Vjetnamio, sendis senprecedence grandegan maran kaj aeran fortojn por fari ekstreme sovaĝan bombadon kaj atakon al la norda Vjetnamio kaj semis minojn en la vjetnamaj havenoj. Kun forta indigno, la nordvjetnamaj popolanoj donis seriozan punbaton al la usonaj agresantoj. De la komenco de aprilo ĝis la fino de aŭgusto, ili faligis 420 usonajn rabistajn aeroplanojn, kaptis nombron da ĝiaj pilotoj kaj difektis 70 el ĝiaj militŝipoj.

En aŭgusto la sudvjetnamaj popolanoj mortigis, vundis kaj kaptis 30.000 malamikojn, ekstermis kaj grave vundis tri infanteriajn brigadojn aŭ regimentojn, unu kirasitan regimenton, du kirasitajn batalionojn, du artileriajn batalionojn kaj tridek batalionojn da ĉefaj fortoj, sekurigaj taĉmentoj kaj popolprotektaj taĉmentoj kaj aliancitajn trupojn. Krome ili

konkeris unu militbazon kaj ĉ. cent apogpunktojn kaj gardejojn, faligis kaj difektis 200 diversspecajn aeroplanojn, militkaptis kaj difektis 400 veturilojn kaj 100 kanonojn, dronigis 20 militŝipojn kaj ŝarĝŝipojn kaj bruligis 20 municiajn kaj benzinajn tenejojn.

PERUA REGISTRARO ABOLIS LA KONCESIOJN AL LA USONA KOMPANIO

La perua Ministrejo de Energio kaj Minoj publikigis dekreton por aboli naŭ koncesiojn donitajn al la uson-posedita perua limigita kompanio de petrolo kaj mineraloj.

La dekreto deklaras: "Kun konsidero pri la fakto ke la perua limigita kompanio de petrolo kaj mineraloj ne pagis la surfacajn impostojn pro ekspluato de tiuj koncesioj en 1969 kaj 1970, estis decide aboli tiujn koncesiojn."

La koncesioj kun totala areo de 160.000 hektaroj estis donitaj de Peruo al la menciita limigita kompanio en 1953 por 50 jaroj.



NOVA SUKCESO EN HIBRIDIGO DE BONRASAJ ĈEVALOJ

Junnan-provinco havas fekundan teron kaj abundajn herbejojn taŭgajn por paŝtado. Por kontentigi la bezonon de produkto kaj popola vivo de la diversaj nacioj, ekde 1953 la diversnivela brutobredaĵo unuoj de la provinco enkondukis 22 bonajn speciojn de ĉevaloj kaj hibridigis ilin kun ĉelokaj bonrasaj ĉevaloj. Post dekelk-jara klopodo oni elkulturis 80,000 bonajn ĉevalojn, kiuj okupas 12% de la totala sumo de ĉevaloj kaj muloj. La hibridigitaj ĉevaloj konservis karakteron de la lokaj ĉevaloj, kiuj kutimas manĝi krudan furaĝon kaj konformas al lokaj naturaj kondiĉoj, kaj kapablas por tirado kaj portado.

LA TORĈA FESTO

Popolanoj de la Lunan-a Ji-nacia Aŭtonoma Gubernio de Junnan-provinco ĝoje pasigis sian tradicion Torĉan Feston en la fame konata pitoreskejo de ŝtona arbaro.

La Torĉa Festo estas tradicia festo de Ji-nacio por memori la venkon en ĝia batalo kontraŭ kruela regado de la ĉefo. Legendo diras, ke en antikveco estis tre feroĉa ĉefo. Por batali kontraŭ lia regado ji-aj popolanoj faris ribelon en la 24-a de la sesa monato laŭ la luna kalendaro. La ribelantoj elektis milojn da kaproj, ligis sur iliaj kornoj torĉojn kaj pelis ilin antaŭen por ĉirkaŭi la ĉefon. Per tiu rimedo ili akiris venkon. Poste oni difinis tiun tagon kiel Torĉan Feston.

Post la Liberiĝo, sub la direktado de la nacia politiko de Prezidanto Maŭ la Torĉa Festo fariĝis festo, en kiu la diversnaciaj popolanoj faras artajn kaj sportajn aktivadojn por firmigi la solidarecon inter la nacioj.

Ĉijare la Torĉa Festo estis eksterordinare vigla. Ne nur ji-aj popolanoj en nacia festa kostumo venis kantante kaj dancante, sed ankaŭ miaŭ-aj, huj-aj, ĝuang-aj, baj-aj, han-aj kaj ali-naciaj komunumanoj venis de diversaj lokoj por rigardi sportan prezentadon. Kiam fortikaj sportistoj brave marŝis mano-en-mane en la sportejon, dekoj da miloj da spektantoj akceptis ilin per varma aplaŭdado.

Dum la festo, artaj propagandaj taĉmentoj prezentis naciajn kantojn kaj dancojn. Kaj komercaj fakoj provizis la popolanojn per abundaj varoj speciale bezonataj de la nacimulmultoj.

KOLEKTO DE NOVAJ KANTOJ ELDONITA

La eldonita kolekto de revoluciaj kantoj enhavas sume 101 novajn kaj malnovajn kantojn kun nova aŭ reviziita teksto en la Granda Proletara Kultura Revolucio. Ĝi montris la atingon de niaj muzikistoj kaj la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la kreado de kantoj.

Ĝi estas bonvena al la vastaj amasoj kaj akcelis pluan disvolviĝon de amasa kanta aktivado en fabrikoj, vilaĝoj, trupoj, institucioj kaj lernejoj.

RIVERBARA KLIZO KONSTRUIĜIS EN TARIMU

La granda pivota akvoutiliga konstruaĵo — riverbara klizo de Tarimu, ekkomencita de majo 1971, jam estis konstruita. Ĝi situas ĉe la kapo de ĝenerala kanalo de sudo ĝis nordo en la Tarimua terkulturebla regiono, havas 32 spanojn, longas je 223 m. kaj altas je 7.4 m.

Tiu konstruaĵo multe pliigos akumulon de akvo en akvokonservejoj ambaŭborde de Tarimu-rivero, kio ne nur ebligos irigacion al 550,000 muoj da agro de la regiono, sed ankaŭ povos fundamente kontentigi irigacion bezonon de 2,400,000

muoj da agro en la perspektiva projekto, tial ĝi kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi agrikulturan produkton de la Tarimua terkulturebliga regiono.

KVIN NAĜISTINOJ ROMPIS 4 LANDAJN REKORDOJN

En konkursoj de naĝado kaj plongo okazigitaj en Pekino en la kuranta jaro, 5 ĉinaj naĝistinoj rompis 4 landajn rekordojn.

Ŝanhaja sportistino Jang Gingli, sportistino Pan Vejĉeng el la Pekina Fizikkultura Instituto kaj liaŭning-a sportistino Baj Hiufen rompis la landan rekordon de virina 100-metra dorsonaĝo de 1 minuto 16.5 sekundoj, respektive per 1 minuto 16 sekundoj, 1 minuto 16.2 sekundoj kaj 1 minuto 16.3 sekundoj.

Liaŭning-a sportistino Ĉen Huan kaj ŝanhaja sportistino Jang Gingli rompis la landan rekordon de virina 200-metra dorsonaĝo de 2 minutoj 47.6 sekundoj respektive per 2 minutoj 46.5 sekundoj kaj 2 minutoj 47.2 sekundoj.

Giangsu-a sportistino Zeng Gujging rompis la landan rekordon de virina 200-metra rapidnaĝo de 2 minutoj 26.3 sekundoj kaj la landan rekordon de virina 400-metra rapidnaĝo de 5 minutoj 13.6 sekundoj per siaj respektivaj atingoj de 2 minutoj 24.6 sekundoj kaj 5 minutoj 10.6 sekundoj.

NOVAJ METIARTAJĴOJ

Kritike heredante la tradicion de popola metiarto, veteranaj metiartistoj de Hubej-provinco kreis kune kun siaj metilernantoj nombron da novaj artaĵoj kun aparta stilo.

Veteranaj lignogravuristoj de Vuhan Liu Maŭhiang kaj aliaj faris longajn tablojn por ĉina liuto, tablajn lampojn, tablojn, benkojn kaj aliajn meblojn, utiligante arboradikojn kun kuriozaj formoj. Tiuj metiartaĵoj kun apartaj desegnoj havas eksterordinarajn kaj elegantajn formojn.

Surbaze de heredo de la tradicia metiarto kaj aplikante modernan teknikon, bambumeblistoj kreis sidajn kaj kuŝajn sofojn, malpezajn librobretojn kun aparta formo, kuŝajn seĝojn kaj aliajn. Tiuj bambuaj mebloj kun simpla kaj fortika strukturo estas faldeblaj, facile transporteblaj kaj tre bonvenigataj de la amasoj.

Veteranaj brodistinoj kaj junaj projektistoj kune projektis kaj brodis novajn vivecajn verkojn kun desegnoj de "Pandoj Mordas Bambuon", "Arĝenta Pilko Kunligas Amikecon" k.a.

HAN GUJFANG ROMPIS DU LANDAJN REKORDOJN DE ARKOPAFO

En la tutlanda prezenta konkurso de arkopafo de 1972, 23-jara debutantino de Liaŭning-provinco Han Gujfang rompis la landajn rekordojn de 1148 poentoj de virina duona konkurso kaj de 2269 de virina totala konkurso respektive per 1166 kaj 2293 poentoj.

Han Gujfang arkopafas.



Sur la Kovrilo:

Lernantino de Popola Komunumo de Tibeto

Sur la Dorskovrilo:

La Popola Ĝardeno de Lhasa de Tibeto

EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 11 (172) 1972

Ĉefa Enhavo

Sukcesoj en la Socialisma Konstruado de Ĉinio	1
Nia Karba Industrio en Prosperiĝo	4
Naskiĝo de Universala Draŝmaŝino	8
Ministo — Inĝeniero... ..	10
Veterana Ruĝarmeano Ĝaŭ Gincaj	13
Kolorriĉaj Popolaj Kantoj kaj Dancoj	17
En la Neforgeseblaj Tagoj de Amikeco	20
Memorigaj Poŝtmarkoj	24
Profunda Frateco apud Tengtiaŭ-rivero	25
Elimino de Veneno al Nengiang-rivero	29
Bona Laborstilo de Komercaj Laborantoj	31
Vizito al Teo-komunumo	32
Disigitaj Parencoj de Du Familioj Estis Retrovitaj	35
Opinioj de Vizitantaj Eksterlandaj Esperantistoj	37
Arbido (<i>Prozaĵo</i>)	38
Adiaŭ al Montego (<i>poemo</i>)	40
La Botanika Ĝardeno de Hangĝou	42
Oleargilaj Modlaĵoj	44
Edifo de Pakajo	44
“Deklaracio de Georgetown”	46



Forstokulturo en Akvoriĉa Loko




Protekta forstozono sur kanalaj bordoj

Kiangiang-gubernio de Hubej-provinco estis akvoriĉa kun tre malmultaj arboj. De antikva tempo, la lignoj bezonataj en tiu loko devis esti alportataj de aliaj lokoj. Post la Liberiĝo, la popolo de Kiangiang-gubernio disvolvis forstigadon. Samtempe kun tio, oni faris kulturebligon de virgatero, ĝardenigon de kampoj kaj konstruadon de vilaĝoj, vojoj, digo kaj aliaj akvoutiligaj konstruaĵoj. Ekde la jaro 1966, la meznombra kvanto de plantitaj arboj en ĉiu jaro estas duoblo de tiu antaŭ 1966. Nun la kamparo de Kiangiang jam povas fundamente kontentigi la bezonon de lignoj per si mem. Apud la ŝoseoj, irigaciaj kanaloj kaj ĉirkaŭ la vilaĝoj jam kreskas ombriĉaj arbaroj. Sur la bordoj de la partoj de la riveroj Hanguang kaj Dongging en tiu gubernio kun totala longeco de 186 kilometroj, protektaj forstozonoj el 8 ĝis 25 vicoj da arboj estas konstruitaj. La rapida disvolviĝo de forstkulturo en tiu loko forte akcelis la pliprodukton de agrokulturo kaj brutobredado en la sinsekvaj jaroj kaj tiu akvoriĉa loko iom post iom fariĝis bela ĝardeno.



Dehakado de superflua arboj






Forstozono de Jongfeng-brigado de Ĝoŭgi-komunumo





Vilaço en arbaro de Ĉenghi-komunumo





Kadro, maljuna forstokultu-
risto kaj intelektaj junuloj
de Hinhin-brigado de Ĉenhi-
komunumo faras sciencan es-
ploradon pri forstokulturo.

Metasekvojoj plantitaj de la
popolo de Kiangiang



Aūoro (ligna skulptaĵo)

